* EL VERKOJ DE LEO TOLSTOJ *

# LEO TOLSTOJ


***PATRIOTISMO KAJ REGISTARO ..5***

***AL POLITIKISTOJ ..29***

***ĤODINKA ..53***

***NE MORTIGU! ..65***



Cercle espérantiste de l'Agenais
Laùte! * F 47340 Laroque Timbaut
1981 * 6 FF

# TOLSTOJ : LIBERA SPIRITO

La Tolstoja genio konsistas el pli ol unu homo : Ĝi entenas grandan artiston, grandan kristanon, estulon el senbridigitaj instinktoj kaj pasioj. Sed laŭ la daŭro de l' vivo, dum ĝia potenco pliampleksiĝas, oni klare vidas tiun, kiu regas : ĝi estas la libera racio.

Kio estas hodiaŭ pli rara ol heroismo, ol beleco, ol sankteco, tio estas libera konscienco. Libera je ĉiu devigo, antaŭjuĝo, idolo, libera je ĉiu dogmo pri klaso, kasto, nacio, ĉiu religio. Vivanto sufiĉe sincera por rigardi per siaj okuloj, ami per sia koro, juĝi per sia racio, ne esti ombro - esti homo.

Plej altgrade Tolstoj donis tiun ekzemplon : Libera li estis. Tiu granda kristano ne estis tia pro obeemo al Kristo; tiu viro kiu dediĉis parton el sia vivo por studi, klarigi, disvastigi Evangelion, neniam diris : "Tio estas vera ĉar estas Evangelia diro", sed "Evangelio estas vera ĉar ĝi tion diris". Kaj pri tio vi mem, via libera racio devas juĝi ties verecon.

Ĉies devo estas ne fidi al aliaj, eĉ se ili estas la plej bonaj, la plej fidindaj, la plej amataj, por ke ili decidu ĉu io estas bona aŭ malbona, sed serĉi mem, serĉi dum sia tuta vivo, se necese kun persistega pacienco. Pli bona estas duonvero, kiun oni mem plenakiris, ol tuta vero, kiun oni lernis de aliaj, parkere, kiel papago. Ĉar tia vero, kiun okulfermite oni adoptas, vero pro obeo, vero pro komplezo, vero pro sklaveco - tia vero estas nur mensogo.

Ĉie ni serĉu veron kaj ĝin elprenu ĉie, kie ni trovos ties floron aŭ grajnon ! Kaj ĝin ni semu je la vento ! De kie ajn ĝi venas, kien ĝi iras, ĝi scios kreski. Ne mankas en la universo bona grundo por animoj. Sed estas necese, ke ili estu liberaj. Estas necese, ke ni sciu ne esti sklavigitaj eĉ de tiuj, kiujn ni admiras. La plej bona omaĝo, kiun ni povas prezenti al homoj kiel Tolstoj, ĝi estas montriĝi liberaj kiel li.

ROMAIN ROLLAND.

# PATRIOTISMO KAJ REGISTARO

1.

Mi estis devigata jam kelkfoje eldiri la penson, ke patriotismo en nia tempo estas sento nenatura, neprudenta, malutila, kaŭzanta la pliparton de tiuj mizeroj, kiujn suferas la homaro, kaj ke tiu sento ne devas esti edukata, kiel oni faras nun, - sed kontraŭe, subpremata kaj detruata per ĉiuj de prudentaj homoj dependantaj rimedoj. Kaj - mirinda afero ! - kvankam tiu sento dependas nur de ĝeneralaj armigoj kaj pereigaj militoj, kiuj elĉerpas la popolon, ĉiuj miaj pruvoj pri la konsekvencoj, anakronismo kaj malutilo de patriotismo, trafis kaj plu trafas nur silenton aŭ intencan nekomprenon aŭ ĉiam ankoraŭ tiun strangan rebaton : oni diras, ke malutila estas nur la malbona patriotismo, ŝovinismo, kaj ke la vera, bona patriotismo estas tre alta morala sento, kiun kondamni estas ne nur neprudente, sed eĉ krime. Kaj pri tio, el kio konsistas tiu vera bona patriotismo, oni aŭ tute ne parolas aŭ anstataŭ klarigi oni elparolas emfazajn frazojn aŭ sub la komprenon de patriotismo oni substarigas ion, kio havas nenion komunan kun tiu patriotismo, kiun ĉiuj ni konas, kaj kiun ni ĉiuj tiel terure suferas.

Ĝenerale oni diras, ke la vera bona patriotismo konsistas en tio, ke oni volas por sia popolo aŭ ŝtato la verajn bonojn, tiajn bonojn, kiuj ne malutilas al la bono de aliaj popoloj.

Antaŭ kelkaj tagoj, parolante kun anglo pri la nuna milito, mi diris al li, ke la vera kaŭzo de tiu milito estas ne iaj profitemaj celoj, kiel oni kutime diras, sed patriotismo, kiel tio estas videbla el la konduto de la tuta angla societo. La anglo ne konsentis kun mi kaj diris, ke se tio

eble estas ĝusta, tio devenis de tio, ke la patriotismo, kiu nun entuziasmigas anglojn, estas malbona patriotismo. La bona patriotismo - tiu, kiun li havas - konsistas en tio, ke la angloj, liaj samlandanoj, ne agu malbone.
-"Ĉu vi volas, ke nur angloj ne agu malbone?" demandis mi.
-"Mi deziras tion ĉi al ĉiuj !" respondis li, per tiu respondo klare montrante, ke la ecoj de veraj bonoj - ĉu tiuj bonoj estas moralaj, sciencaj aŭ eĉ praktikaj - laŭ sia esenco estas tiaj, ke ili disvastiĝas sur ĉiujn homojn kaj sekve la deziro de tiuj bonoj al kiu ajn ne nur ne estas patriotismo, sed eligas ĝin.

Egale ne estas patriotismo la apartaĵoj de ĉiu popolo, kiujn la defendantoj de patriotismo subŝovas sub tiun komprenon. Ili diras, ke la apartaĵoj de ĉiu popolo estas la nepra kondiĉo por progresado de homaro kaj tial la patriotismo, penadanta konservi tiujn apartaĵojn, estas bona kaj utila sento. Sed ĉu ne estas evidente, ke se iam tiuj apartaĵoj de ĉiu popolo, moroj, kredoj, lingvo, estis nepra kondiĉo por vivo de homaro, en la nuna tempo tiuj samaj apartaĵoj estas la ĉefa malhelpaĵo por efektivigo de la de homoj komprenata idealo - frateca unuiĝo de popoloj. Kaj tial la konservo kaj defendo de apartaĵoj de kia ajn - rusa, germana, franca, anglosaksa, elvokante la saman konservadon kaj defendadon de hungara, pola, irlanda nacieco kaj eĉ de vaska, provenca, mordva, ĉuvaŝa kaj de multegaj aliaj nacioj - servas ne al la unuiĝo de homoj, sed al ĉiam pli granda ilia fremdiĝo kaj dividiĝo.

Sekve la vera kaj ne imagita patriotismo estas tiu, kiun ĉiuj ni konas, sub kies influo estas la pliparto de la nuntempaj homoj kaj kiun tiel terure suferas la homaro - tiu patriotismo ne estas deziro de spiritaj bonoj al sia popolo (deziri la spiritajn bonojn nur por sia popolo oni ne povas), kaj ne apartaĵoj de popo-

laj individuecoj (tio estas eco, sed neniel sento), sed estas tre difinita sento preferi sian popolon aŭ ŝtaton kompare kun ĉiuj aliaj popoloj aŭ ŝtatoj, kaj tial estas la deziro por tiu popolo aŭ ŝtato je plej granda bonstato kaj potenco, kiuj povas esti akirataj kaj ĉiam estas akirataj per malutilo al la bonstato kaj potenco de aliaj popoloj kaj ŝtatoj.

Ŝajnas do evidente, ke patriotismo kiel sento estas sento malbona kaj malutila, kiel doktrino estas doktrino malsaĝa, ĉar estas klare, ke se ĉiu popolo kaj ŝtato rigardos sin kiel plej bonan el ĉiuj popoloj kaj regnoj, tiam ĉiu el ili estos en maldelikata kaj malutila eraro.

2.

Ŝajnas, ke la malutilo kaj malsaĝo de patriotismo devus esti evidentaj al ĉiuj homoj. Sed estas mirinde, ke la inteligentuloj, scienculoj, ne nur ne vidas tion, sed kun grandega obstino kaj ekscitiĝo, kvankam sen iuj prudentaj fundamentoj, pridisputas ĉiun montron sur la malutilon kaj malsaĝon de patriotismo kaj plu laŭdadas ĝian bonfaremon kaj altecon.

Kion tio ĉi signifas ?

Prezentas sin al mi nur unu klarigo pri tiu mirinda fenomeno. La tuta historio de la homaro de antikvaj tempoj ĝis la estonto povas esti konsiderata kiel antaŭenirado de homarkonscio kaj de apartaj homoj, kaj de unuspecaj ĝiaj tutaĵoj, de ideoj malsuperaj al ideoj superaj.

La tutan vojon trairitan kiel de ĉiu aparta homo, tiel de unuspecaj homaj grupoj, oni povas imagi kiel sinsekvan vicon de ŝtupoj de malsupera troviĝanta sur nivelo de

animala vivo ĝis la plej supera ŝtupo, ĝis kiu povas leviĝi la homa konscio en la nuna historia momento.

Ĉiu homo, kaj same ankaŭ la apartaj unuspecaj grupoj - popoloj, ŝtatoj - ĉiam iris kaj iras per tiuj kvazaŭaj ŝtupoj de ideoj. La unuaj partoj de homaro iras antaŭe, la aliaj malantaŭrestas malproksime, triaj - la plimulto - moviĝas en la mezo. Sed ĉiuj, sur kiu ajn ŝtupo ili troviĝas, nepre kaj nehaltigeble moviĝas de malsuperaj al la supraj. Kaj ĉiam, en ĉiu donita momento, kiel la aparta homo, tiel ankaŭ la unuspeca homa grupo - antaŭa, meza aŭ malantaŭa - havas tri diversajn rilatojn al la tri ideaj ŝtupoj, inter kiuj ili moviĝas. Ĉiam kiel por aparta homo, tiel por aparta homa grupo, ekzistas pasintaj ideoj, kadukaj kaj fremdiĝintaj, al kiuj la homoj ne plu povas reveni, kiel ekzemple por nia kristana mondo la ideoj de kanibalismo, de tutpopola rabado, de edzinrabado, ktp, pri kiuj estas nur rememoroj. Estas la ideoj de estanteco, kiuj estas inspirataj al homoj per edukado, ekzemplo, per tuta agadmaniero de ĉirkaŭanta medio, la ideoj, sub kies regado oni vivas en donita tempo, kiel ekzemple en la nuna tempo : la ideoj de proprreco, de ŝtata ordo, komerco, uzo de dombestoj, ktp. Kaj estas ideoj de estonteco, el kiuj kelkaj estas jam proksimaj al efektiviĝo, kiuj devigas la homojn ŝanĝi sian vivon kaj batali kontraŭ fruaj vivoformoj, kiel ekzemple en nia mondo la ideoj pri liberigo de laboristoj, egalrajteco de virinoj, ĉesigo de viandmanĝado kaj aliaj ideoj, jam konsciaj al homoj, sed ankoraŭ ne ekbatalintaj kontraŭ fruaj vivoformoj. Tiaj estas en nuntempo t.n. idealoj, ekzemple ideoj pri forigo de trudo, enkonduko de havaĵkomuneco, de unu religio, de ĝenerala homa frateco. Kaj tial ĉiu homo kaj ĉiu unuopa homa unuiĝo, sur kiu ajn ŝtupo ĝi troviĝas, havante malantaŭ si la kadukajn rememorojn pri

pasintaĵo kaj antaŭ si la idealojn de estonteco, - ĉiam estas en batalprocezo inter aktualaj ideoj de estanteco kaj la enirintaj en vivon ideoj de estonteco. Tio okazas tiel, ke kiam la ideo, iam utila kaj eĉ nepra dum la pasinteco, fariĝas superflua, tiu ideo post pli-malpli daŭra batalado cedas lokon al nova ideo, iam antaŭe idealo kaj fariĝanta nun ideo de estanteco.

Sed okazas ankaŭ, ke la kaduka ideo, jam anstataŭita en homara konscio per supera ideo, estas tia, ke ĝia konservo estas utila por iuj homoj, havantaj la plej grandan influon sur la socion. Kaj tiam okazas, ke tiu kaduka ideo, malgraŭ sia akra kontraŭdiro al tuta alirilate ŝanĝiĝinta vivordo, plu influas la homojn kaj plu direktas ilian konduton. Tia rehaltigo de kaduka ideo ĉiam okazis kaj okazas en la religia vivo. La kaŭzo estas, ke la oferpastroj, kies profitplena situacio estas kunligita kun la kaduka religia ideo, uzante sian potencon, intence tenas la homojn en la kaduka ideo.

Tio sama kaj pro tiuj samaj kaŭzoj okazas en ŝtata vivo rilate al la ideo de patriotismo, sur kiu fondiĝas ĉia ŝtateco. La homoj, al kiuj estas profitdona la konservo de tiu ideo jam havanta nek sencon nek utilon, artifike subtenas ĝin. Kaj posedante la plej potencajn rimedojn por influi homojn, ili ĉiam povas tion fari.

En tio prezentiĝas al mi la klarigo pri tiu stranga kontraŭdiro, en kiu troviĝas la ideo de patriotismo kun tuta kontraŭa al ĝi ordo de ideoj, kiuj jam eniris dum nuntempo en la konscion de kristana mondo.

3.

La patriotismo, kiel sento de ekskluziva amo al sia popolo kaj kiel doktrino pri heroa

oferemo de sia trankvilo, havaĵo kaj eĉ vivo por defendi la malfortulojn kontraŭ la mortigado kaj malbona traktado de malamikoj, - estis la plej alta ideo de tiu tempo, kiam ĉiu popolo konsideris ebla kaj justa por sia bono kaj potenciĝo submeti al la mortigado kaj rabado la homojn de alia popolo ; sed jam antaŭ ĉ. 2000 jaroj la plej eminentaj reprezentantoj de homa saĝo komencis kompreni la pli altan ideon de homarfrateco, kaj tiu ideo, ĉiam pli kaj pli enirante la konscion, en nia tempo ricevis diversspecan efektivigon. Dank'al plifaciligo de komunikaj rimedoj, unueco de industrio, komerco, artoj, sciencoj, la homoj de nia tempo estas en tia grado ligitaj inter si, ke la danĝero de konkeroj, mortigaj subpremoj fare de najbaraj popoloj jam tute malaperis, kaj ĉiuj popoloj (popoloj, sed ne registaroj) vivas en pacaj, por ambaŭ flankoj profitdonaj, amike - komercaj, industriaj, sciencaj interrilatoj, kiujn interrompi estas por ili nek senco nek neceso. Kaj tial ŝajnas, ke la kaduka patriotisma sento, kiel superflua kaj neakordiĝanta kun la en vivon enirinta konscio pri homarfrateco, devus ĉiam pli kaj pli malaperadi kaj fine tute malaperi. Verdire, tamen efektiviĝas la kontraŭaĵo : tiu malutila, kaduka sento ne nur plu ekzistas, sed ĉiam pli kaj pli ekflamiĝas.

La popoloj sen ia prudenta fundamento, kontraŭ sia konscio kaj siaj profitoj, ne nur konsentas kun siaj registaroj en iliaj atakoj kontraŭ aliaj popoloj, en iliaj konkeroj de fremdaj regionoj, kaj en perforta reteno de tio, kio jam estas perfortprenita, - sed eĉ mem postulas tiujn atakojn, rabadon kaj perfortan retenon, ĝojas pri ili, fieras pri ili. La malgrandaj perfortataj popoloj, submetitaj sub la potencon de grandaj ŝtatoj,

- poloj, irlandanoj, ĉeĥoj, finnoj, armenoj, - reagante kontraŭ premanta ilin patriotismo de konkerintoj, ĝis tia grado infektiĝis de la premantaj ilin popoloj je tiu kaduka, fariĝinta nenecesa, sensenca kaj malutila sento de patriotismo, ke ilia tuta agado koncentriĝas sur ĝi kaj ke ili mem, suferante de patriotismo de potencaj popoloj, estas pretaj pro tiu patriotismo fari sur aliaj popoloj tion saman, kion la konkerintaj popoloj faris kaj faras kontraŭ ili.

Tio ĉi devenas de tio, ke la regantaj klasoj (t.e. ne nur registaroj kun ties oficistoj, sed ankaŭ ĉiuj klasoj ĝuantaj privilegian situacion : kapitalistoj, ĵurnalistoj, la plimulto da artistoj, scienculoj) povas teni sian ekskluzive profitdonan - kompare kun popolamasoj - situacion nur dank'al la nuna ŝtatordo, subtenata per patriotismo. Havanto en siaj manoj ĉiujn plej potencajn rimedojn por influi la popolon, ili ĉiam nedeflankiĝante subtenas en si kaj en aliaj patriotajn sentojn des pli, ĉar tiuj sentoj, subtenantaj la ŝtatan potencon, pli ol ĉio alia estas rekompencataj per tiu potenco.

Ĉiu oficisto des pli progresas en sia kariero, ju pli li estas patriota ; same la militisto en sia kariero povas altiĝi nur dum milito, kiu estas elvokata per patriotismo.

La patriotismo kaj ĝiaj konsekvencoj - militoj - donas grandegan enspezon al ĵurnalistoj kaj profiton al pliparto de komercistoj. Ĉiu verkisto, instruisto, profesoro, des pli certigas sian situacion, ju pli li predikas patriotismon. Ĉiu imperiestro, reĝo, des pli akiras laŭdon, ju pli ili estas sindonaj al patriotismo.

En la manoj de regantaj klasoj troviĝas

militistaro, mono, lernejo, religio, gazetaro. En la lernejoj ili disbruligas en infanoj patriotismon per historioj, priskribante sian popolon kiel la plej bonan kaj ĉiam justan ; en plenaĝuloj oni disbruligas tiun senton per vidaĵoj, festoj, monumentoj, per patriota, mensogema gazetaro ; oni disbruligas patriotismon ĉefe per tio, ke, farante diversspecajn maljustaĵojn kaj kruelaĵojn kontraŭ aliaj popoloj, oni ekscitas en ili la malamon al sia popolo, kaj poste oni uzas tiun malamon por veki la saman en la propra popolo.

La ekbruliĝo de tiu terura sento - patriotismo - ĉe la eŭropaj popoloj rapide progresis kaj en nia tempo atingis la ekstreman gradon ; iri pli malproksimen ne estas eble.

4.

En la memoro de ĉiuj eĉ ne tre maljunaj homoj ekiĝis io, plej evidente elmontranta tiun mirindan malsaĝiĝon, al kiu homoj de la kristana mondo estis alkondukitaj per patriotismo.

La regantaj klasoj disbruligis patriotismon en siaj popolamasoj ĝis tia grado, ke en la dua duono de la XIXa jarcento estis proponita leĝo, laŭ kiu ĉiuj homoj senescepte devas fariĝi soldatoj ; ĉiuj filoj, edzoj, patroj, devas lerni la mortigadon, esti obeemaj sklavoj de la unua supera rango kaj esti pretaj senrifuze mortigi tiujn, kiujn oni ordonos al ili mortigi : homojn de perfortataj popoloj kaj siajn laboristojn, defendantajn siajn rajtojn, mortigi siajn patrojn kaj fratojn...

Tiu terura leĝo, plej krude ofendanta ĉiujn plibonajn homajn sentojn, sub la influo de patriotismo senmurmure estis akcept-

ita de popoloj, kaj ĉiuj homoj de kontinentaj regnoj senmurmure submetiĝis al enkonduko de ĝenerala militservo, t.e. al sklaveco, kun kiu laŭ grado de malaltigo kaj senliberigo povas esti komparata neniu el la antikvaj sklavecoj. Post tio la sklava submetiĝo de popolamasoj, en la nomo de patriotismo, kaj la impertinento, krueleco kaj malsaĝeco de registaroj ne trovis plu limojn. Elvokataj parte per kaprico, parte per vanteco, parte per avido, komenciĝis vetrabadoj kontraŭ fremdaj landoj en Azio, Afriko, Ameriko kaj ĉiam pli kaj pli granda malkonfido kaj kolero de unuj registaroj kontraŭ la aliaj.

La malaperigo de popoloj sur la perforte prenitaj landpartoj estas konsiderata kiel io memkomprenebla. La demando konsistis nur en tio, kiu la unua perforte prenos la fremdan landon kaj malaperigos ĝiajn loĝantojn. Ĉiuj regantoj ne nur plej malkaŝe krimis unu kontraŭ alia kaj kontraŭ elementaj postuloj de justeco, sed faris kaj faras diversspecajn trompojn, friponaĵojn, subaĉetojn, dokumentfalsadon, spionadojn, rabadon, mortigadon, kaj la popoloj ne nur konsentis kaj konsentas pri tio, sed ĝojas, ke ne aliaj ŝtatoj, sed iliaj faras tiujn malbonaĵojn. La reciproka malamo de popoloj kaj ŝtatoj en la lasta tempo atingis tiajn mirindajn ampleksojn, ke malgraŭ tio, ke estas nenia kaŭzo, por ke unuj ŝtatoj ataku aliajn, ĉiuj scias, ke ĉiuj ŝtatoj ĉiam staras unu kontraŭ alia kun elŝovitaj ungegoj kaj malfermita buŝego, kaj atendas nur, ke iun trafu ia malbono kaj ke ĝi malfortiĝu, por ke oni povu kun plej malgranda danĝero ataki ĝin kaj disŝiri.

Ĉiuj popoloj de la t.n. kristana mondo per patriotismo estas alkondukitaj ĝis tia bestiĝo, ke volas mortigadon aŭ ĝojas pri ĝi ne nur tiuj homoj, kiuj estas metitaj en

necesecon mortigi aŭ esti mortigataj, sed eĉ homoj trankvile loĝantaj en siaj de neniu minacataj domoj en Eŭropo, dank'al rapidaj komunikiloj kaj gazetaro, ĉiuj homoj de Eŭropo kaj Ameriko - dum ĉiu milito - estas en la situacio de rigardantoj en roma cirko kaj tiel same, kiel en la jena ĝojas pri mortigado kaj tiel same sangavide kriegas : "pollice verso !"

Ne nur plenaĝuloj, sed eĉ infanoj, puraj, saĝaj infanoj, konsiderante la naciecon al kiu ili apartenas, ĝojas, kiam ili ekscias, ke estas mortigitaj, disŝiritaj per kugloj ne 700 sed 1000 angloj aŭ buroj. Kaj la gepatroj, mi konas tiajn, flamigas la infanojn por tiu bestiĝo.

Sed tio estas ankoraŭ nesufiĉa. Ĉiu pligrandigo de armeo en unu ŝtato - kaj ĉiu ŝtato, troviĝante en danĝero, pro patriotismo penas pligrandigi ĝin - devigas la najbaran ankaŭ pro patriotismo pligrandigi sian armeon, kio elvokas novan pligrandigon en la unua.

Tio sama okazas pri fortikaĵoj ; ŝiparo : unu ŝtato konstruis 10 batalŝipojn, la najbara konstruis 11 ; tiam la unua konstruas 12 kaj tiel plu laŭ senfina progresado.

- Mi pinĉos cin. - Kaj mi batos cin per pugno. - Mi cin per vipo. - Kaj mi cin per bastono. - Kaj mi pafos... : tiel malpacadas kaj batas unu la alian nur la malbonaj infanoj, drinkemuloj aŭ bestoj, kaj dume tio okazas ankaŭ en la mezo de plej altaj reprezentantoj de plej kulturaj ŝtatoj, tiuj samaj ŝtatoj, kiuj gvidas la edukadon kaj moralon de siaj regatoj.

5.

La situacio malboniĝas ĉiam pli kaj pli, kaj estas nenia eblo haltigi tiun malboniĝon

kondukantan al tuta pereo. La sola sin prezentanta al kredemuloj elveno el tiu situacio estas fermita per la lastaj okazaĵoj : mi parolas pri la Haga konferenco kaj la tuj poste sekvinta milito inter Anglio kaj Transvalo.

Se la malmulte aŭ supraĵe pensantaj homoj povis konsoliĝi per la penso, ke la internaciaj juĝejoj povas forigi la mizeregon de milito kaj de ĉiam kreskantaj armadoj, la Haga konferenco kun la ĝin sekvinta milito plej evidente montris la neeblon solvi la problemon sur tiu vojo. Post la Haga konferenco fariĝis evidente, ke dum ekzistas registaroj kun armeoj, ĉesigo de militoj kaj armiĝoj estas neebla. Por ke estu ebla la konsentiĝo, estas necese, ke la kontraktantoj konfidu unu al alia, estas necese, ke ili demetu la armilojn, kiel tion faras la intersenditoj, kiam ili kunvenas por konsiliĝoj.

Kaj dum la registaroj, ne konfidante unu al alia, ne nur ne forigas, ne malgrandigas, sed ĉiam pligrandigas armeojn, konsiderante la pligrandigon ĉe la najbaroj, atente per spionoj observas ĉiun translokigon de armeoj, sciante, ke ĉiu regno atakos la alian, kiam ĝi ekhavos por tio eblon - estas ĉiu interkonsento neebla, kaj ĉiu konferenco estas aŭ malsaĝaĵo, aŭ ludo, aŭ trompo, aŭ arogantaĵo, aŭ ĉio ĉi kune.

Certe al la rusa registaro estis plej konvene esti "la terura bubo" de tiu konferenco. La rusa registaro estas tiel dorlotata per tio, ke hejme neniu kontraŭstaras ĉiujn evidente mensogajn manifestojn, kaj ke senhezite ruiniginte sian popolon per armadoj, sufokinte Polion, elrabinte Turkestanon, Ĉinion kaj kun aparta kolero sufokante Finnlandon, kun plena certeco, ke ĉiuj konfidos al ĝi, ĝi proponis al registaroj malarmadon.

Sed kiel ajn stranga, neatendita kaj malkonvena estis tiu propono, precipe en tiu sama tempo, kiam estis donita ordono pri la pligrandigo de armeoj, la vortoj aŭdeble eldiritaj por ĉiu estis tiaj, ke la registaroj de aliaj ŝtatoj antaŭ siaj regatoj ne povis rifuzi la partoprenon en komikaj, evidente mensogaj konsiliĝoj. Kaj la delegitoj kunvenis, antaŭe sciante ke el tio povas fariĝi nenio, kaj dum kelkaj monatoj ili ricevis bonan salajron, ridetis en sian manikon, ĉiuj bonkonscie hipokritis, kvazaŭ ili zorgus pri starigo de paco inter la popoloj.

La Haga konferenco, finiĝinte per terura sangoverŝo - transvala milito, kiun neniu penis kaj penas haltigi, tamen estis utila, kvankam tute ne per tio, kion oni atendis de ĝi ; ĝi estis utila per tio, ke ĝi evidente pruvis, ke la malbonon, kiun suferas la popoloj, ne povas ripari registaroj ; eĉ se ili sincere volus tion, ili povus forigi nek armadojn, nek militojn. Por ekzisti la registaroj devas defendi sian popolon kontraŭ la atakoj de aliaj popoloj ; sed neniu popolo volas ataki kaj neniu atakas la alian, kaj tial la registaroj ne nur ne volas pacon, sed diligente ekscitas la malamon kontraŭ si ĉe aliaj popoloj, kaj en sia popolo patriotismon, la registaroj konvinkas sian popolon, ke ĝi estas en danĝero kaj ke estas necese sin defendi.

Kaj havante la potencon en siaj manoj, la registaroj povas inciti aliajn popolojn kaj elvoki patriotismon en sia popolo, kaj diligente faras tion kaj tion ĉi, kaj ne povas ne fari tion, ĉar sur tio kuŝas ilia ekzisto.

Se la registaroj estis necesaj antaŭe por defendi siajn popolojn kontraŭ fremdaj atakoj, nun male registaroj artifike rompas la

pacon ekzistantan inter popoloj, kaj elvokas inter ili la malamon.

Se estis necese plugi por semi, tiel la plugado estis prudenta afero ; sed evidente estas malsaĝe kaj malutile plugi, kiam la semitaĵo jam kreskas. Kaj la registaroj devigas siajn popolojn fari tion, detruadi tiun unuiĝon, kiu ekzistas kaj per nenio estus malhelpata, se ne ekzistus registaroj.

6.

Kaj fakte kio estas en nia tempo registaroj, sen kiuj ŝajnas al homoj neeble ekzisti?

Se estis tempo, kiam la registaroj estis necesa kaj malplia malbono ol tiu, kiu devenis de sendefendeco kontraŭ la organizitaj najbaroj, nun la registaroj fariĝis nenecesa kaj pli granda malbono ol ĉio tio, per kio ili timigas siajn popolojn.

La registaroj ne nur militistaj, sed la estraroj ĝenerale povas esti, mi ne diras - utilaj, sed ne malutilaj nur en tiu kazo, se ili konsistas el nepekemaj sanktaj homoj, kiel tio ankaŭ estas supozata ĉe la ĉinoj. Sed la registaroj do laŭ sia agado, fakte nur perforta, ĉiam konsistas el elementoj la plej kontraŭaj al sankteco, el plej impertinentaj, malnoblaj kaj senmoraligitaj homoj.

Tial ĉiu registaro, des pli la registaro, al kiu estas lasata la milita potenco, estas terura, la plej danĝera institucio en la mondo.

La registaro en plej vasta senco, t.e. ankaŭ kapitalistoj kaj gazetaro, estas nenio alia ol tia organizo, ĉe kiu la plimulto da homoj dependas de malplia parto ordonanta ilin. Tiu malplia parto submetiĝas sub la potenco de ankoraŭ pli malgranda, tiu al ankoraŭ pli malgranda ktp, ĝis fine kelkaj

aŭ ununura homo per milita perforto ricevas potencon super ĉiuj ceteraj. Tiel tiu konstruo similas konuson, kies ĉiuj partoj estas en plena dependeco de tiuj personoj aŭ de tiu persono, kiu troviĝas sur ĝia pinto.

La pinton de tiu konuso kaptas tiuj homoj aŭ tiu homo, kiu estas pli ruza, impertinenta kaj senkonscienca ol aliaj, aŭ la okaza heredanto de tiuj, kiuj estis pli impertinentaj kaj senkonsciencaj.

Hodiaŭ Boris Godunov, morgaŭ Grigorij Otrepjev, hodiaŭ malĉasta Ekaterina kun helpo de siaj amantoj sufokinta sian edzon, morgaŭ Pugaĉev, postmorgaŭ malsaĝa Pavel, Nikolaj, Aleksandro IIIa.

Hodiaŭ Napoleono, morgaŭ Burbono, aŭ Orleano, Boulanger aŭ la kompanio de panamistoj ; hodiaŭ Gladstone, morgaŭ Salisbury, Chamberlain, Rhodes.

Kaj al tiaj registaroj oni konfidas plenan potencon ne nur je havaĵo kaj vivo, sed ankaŭ je spirita kaj morala disvolviĝo, edukado, je la religia gvidado de ĉiuj homoj.

Konstruas al si la homoj tian teruran maŝinon de potenco, lasante perfortpreni tiun potencon al kiu ajn (kaj ĉiuj ŝancoj estas por tio, ke ĝin ekkaptos la plej fripona homo) kaj sklave submetiĝas al li, kaj poste miras, kial al ili estas malbone. Oni timas minojn, anarkiistojn, sed ne timas tiun teruran institucion minacantan ĉiun minuton per plej grandaj mizeroj.

La homoj trovis, ke por sin defendi kontraŭ malamikoj estas bone sin kunligi per ŝnuro, kiel faras la sin defendantaj ĉerkesoj. Sed ekzistas nenia danĝero, kaj tamen la homoj plu ligadas sin.

Zorgplene ili ligas sin tiel, ke unu homo

povas fari el ili, kion li ekvolos ; poste la finon de la ilin liganta ŝnuro oni lasas flirti, ebligante al la unua sentaŭgulo aŭ malsaĝulo ekkapti ĝin kaj fari el ili ĉion, kio estos por li necesa.

Kion alian, se ne tion saman faras la popoloj, submetiĝante, organizante kaj subtenante la registaron organizitan per milita potenco ?

7.

Por liberigi homojn el tiuj teruraj milit- kaj armad-mizeroj, kiujn ili suferas nun, kaj kiuj ĉiam pligrandiĝas, estas necesaj nek kongresoj, nek konferencoj, nek traktatoj, nek juĝejoj, sed la forigo de tiu devigilo, kiu sin nomas registaro, kaj de kiu devenas la plej grandaj mizeroj.

Por forigi registarojn estas nur unu rimedo : estas necese, ke homoj ekkomprenu, ke tiu patriotisma sento, kiu subtenas tiun devigilon, estas sento kruda, malutila, honta, malbona, kaj ĉefe - malmorala. Maldelikata sento ĝi estas tial, ke ĝi estas propra nur al homoj starantaj sur la plej malsupra morala ŝtupo, atendantaj de aliaj popoloj tiujn samajn perfortojn, kiujn ili mem estas pretaj fari ; malutila tial, ke ĝi malebligas la profitajn kaj ĝojajn interrilatojn kun aliaj popoloj, sed ĉefe, ĉar ĝi kreas tiun organizon de registaroj, ĉe kiu povas ricevi kaj ricevas la estrecon la plej malbona ; honta tiu sento estas tial, ke ĝi ŝanĝas la homon ne nur en sklavon, sed eĉ en batalan kokon, bovon, gladiatoron, kiu malŝparas siajn fortojn ne por siaj celoj, sed por tiuj de registaroj ; la sento estas malmorala tial, ke anstataŭ konfesi sin filo de Dio, kiel tion instruas al ni la kristanismo, aŭ almenaŭ libera homo gvidata per la prudento - ĉiu homo sub influo de patriotismo konfesas sin filo de sia patrujo,

sklavo de sia registaro, kaj faras aferojn, kiuj estas kontraŭaj al liaj prudento kaj konscienco.

Necesas nur kompreni tion kaj per si mem sen batalo disfalos la terura homa enkatenigo, nomata registaro, kaj kun ĝi tiu terura, malutila malbono, kiun ili kaŭzas al la popoloj.

Kaj la homoj jam komencas tion kompreni. Jen ekzemple kion skribas burĝo de Usono :

"Tio nura, kion petas ni ĉiuj - la vilaĝanoj, meĥanikistoj, komercistoj, fabrikistoj, instruistoj - estas la rajto okupi nin pri niaj privataj aferoj. Ni havas niajn domojn, ni amas niajn amikojn, estas sindonaj al niaj familioj kaj ne enmiksas nin en aferojn de niaj najbaroj, ni havas laboron kaj ni volas labori. Lasu nin en trankvilo !

"Sed la politikistoj ne volas lasi nin. Ili trudas al ni impostojn, formanĝas nian havaĵon, kalkulas nin, vokas nian junularon en militservon.

"Tutaj miriadoj, vivantaj sur la kalkulo de la ŝtato, dependas de ĝi, estas de ĝi subtenataj por premi nin per impostoj ; por povi sukcese ricevi impostojn, oni tenas konstantajn armeojn. La diro, kvazaŭ la armeoj estas necesaj por defendi landon, estas evidenta trompo. La franca registaro timigas sian popolon, dirante, ke la germanoj volas ataki ĝin ; la rusoj timas la anglojn ; la angloj timas ĉiujn ; nun oni diras al ni en Ameriko, ke oni devas pligrandigi ŝiparon kaj armeon, ĉar Eŭropo povas ĉiumomente unuiĝi kontraŭ ni. Tio estas trompo kaj malvero. La popolo en Francio, Germanio, Anglio kaj Ameriko estas kontraŭ milito. Ni volas nur, ke oni lasu nin en trankvilo. La homoj havantaj gepatrojn, infanojn, edzinojn, domojn, ne volas foriri batali kontraŭ kiu

ajn. Ni estas pacemaj kaj timas militon, ni malamas ĝin.

"Ni volas nur ne fari al aliaj tion, kion ni ne volas, ke oni al ni faru.

"La milito estas nepra konsekvenco de tenado de armitaj homoj. Lando, tenanta grandan konstantan armeon, frue-malfrue militos. La homo, kiu fieras pri sia muskola forto kiel pugnobatalanto, iam renkontos homon, konsiderantan sin kiel plej bonan batalanton, - kaj ili batalos. Germanio kaj Francio atendas nur okazon por mezuri siajn fortojn. Ili batalis jam kelkfoje kaj batalos denove. Estos ne tiel, kvazaŭ iliaj popoloj dezirus militon, sed la supera klaso ekscitos en ili la reciprokan malamon kaj devigos la homojn pensi, ke ili devas batali por sin defendi.

"La homojn, kiuj volas vivi laŭ Kristo, oni devigas pagi impostojn, oni ofendas ilin, trompas kaj envolvas en militojn. Kristo instruis humilecon, dolĉanimecon, pardonon de ofendoj kaj tion, ke mortigi estas malbone. La Biblio instruas ne ĵuri, sed la supera klaso devigas nin ĵuri je la Biblio kiun ĝi mem ne kredas.

"Kiel liberiĝi de tiuj malŝparemuloj, kiuj ne laboras kaj tamen estas vestitaj en maldika lanaĵo kun kupraj butonoj kaj multekostaj ornamoj, kiuj nutras sin per niaj laboroj, por kiuj ni kulturas teron ?

"Ĉu batali kontraŭ ili ?

"Sed ni ja malaprobas la sangverŝadon, kaj krome ili posedas armilojn kaj monon, kaj ili kontraŭstaros pli longe ol ni.

"Sed el kiu konsistas tiu armeo, kiu batalos kontraŭ ni ?

"Tiu armeo konsistas el ni, el niaj trompitaj najbaroj kaj fratoj, kiujn oni certigis,

ke ili servas al Dio, defendante sian patrujon kontraŭ malamiko.

"Kaj verdire nia lando havas neniajn malamikojn krom la supera klaso, kiu prenis sur sin prizorgi niajn interesojn, se nur ni konsentos pagi impostojn. Ili elsuĉas niajn havaĵojn kaj starigas niajn verajn fratojn kontraŭ ni por sklavigi kaj humiligi nin.

"Vi ne povas sendi telegramon al via edzino aŭ amiko, aŭ ĉekon al via liveranto, se vi ne pagas imposton prenatan por teni armitajn homojn, kiuj povas esti uzataj por mortigi vin, kaj kiuj sendube metos vin en malliberejon, se vi ne pagos.

"La sola savo konsistas en tio, ke oni inspiru homojn, ke mortigi estas malbono, ke la tuta leĝo kaj profetoj konsistas en tio, ke oni devas fari al aliaj tion, kion oni volas, ke oni faru al ni. Silente malatentu tiun superan klason, rifuzu fleksiĝi antaŭ ties militisma idolo. Ĉesu subtenadi la predikistojn, kiuj predikas militon kaj montras patriotismon kiel ion gravan.

"Iru ankaŭ ili labori, kiel ni.

"Ni kredas je Kristo, kaj ili ne. Kristo parolis tion, kion Li pensis ; ili parolas tion, per kio ili esperas plaĉi al homoj havantaj potencon - al la "supera klaso".

"Via trompa krio : "lupo, lupo!" ne ektimigos nin. Ni pagas viajn impostojn nur tial, ke ni estas devigataj fari tion. Ni pagos ilin nur tiel longe, kiel ni estos devigataj. Ni ne pagos preĝejajn impostojn al la ŝajnsanktuloj nek la dekonon por via hipokrita bonfarado, kaj ĉe ĉiu okazo ni eldiros nian opinion.

"Ni edukos homojn.

"Dume, nia silenta influo disvastiĝados ;

kaj eĉ la homoj jam servantaj en armeo ŝanceliĝos batali. Ni inspiros la penson, ke la kristana vivo en paco kaj bonvolemo estas pli bona, ol vivo de batalŏj, sangverŝado kaj milito.

"Paco sur tero!" - povos komenciĝi nur kiam la homoj liberiĝos de armeoj, kaj deziros fari al aliaj tion, kion ili volas, ke oni al ili faru."

Tiel skribas ŝtatano de Usono, kaj diversloke en diversaj formoj laŭtiĝas similaj voĉoj.

Jen kion skribas germana soldato :

"Mi partoprenis en militiroj kune kun la prusa gvardio (1866-1870) kaj malamas la militon el profundeco de mia animo, ĉar ĝi igis min nedireble malfeliĉa. Ni, la vunditaj batalintoj, plejparte ricevas tiel mizeran rekompencon, ke oni vere devas honti, ke iam ni estis patriotoj. Mi, ekzemple, ĉiutage ricevas 80 pfenigojn por mia dekstra mano trafita en la atako sur S. Privat la 18an de aŭgusto 1870. Eĉ la ĉashundo bezonas pli por sia vivteno. Kaj mi suferadis tutajn jarojn je mia dufoje trapafita mano. Jam en la jaro 1866 mi partoprenis en la milito kontraŭ Aŭstrio, batalis ĉe Traŭtenaŭ kaj Königgratz kaj vidis multegajn teruraĵojn. En la jaro 1870 mi kiel rezervisto estis denove vokata kaj, kiel mi jam diris, estis vundita en la atako ĉe S. Privat : mia dekstra mano estis dufoje laŭlonge trapafita. Mi perdis bonan pozicion (mi estis bierfaristo) kaj poste ne povis plu ĝin rericevi. De tiam mi jam ne povis stariĝi sur piedoj. Blindiĝo baldaŭ distriĝis, kaj al batalinto-invalido restis nur sin nutri per mizeraj groŝoj kaj almozo...

"En la mondo, kie homoj kuradas kvazaŭ dresitaj bestoj kaj estas nekapablaj por ia alia penso, ol kiel ruzsuperi unu la alian

pro monavido, en tia mondo oni konsideru min kiel strangulon, mi tamen sentas en mi la Dian penson pri paco, kiu tiel belege estas esprimita en la surmonta prediko. Laŭ mia profundega konvinko, la milito estas nur komerco de vantaj kaj potencaj homoj je la feliĉo de popoloj.

"Kaj kiajn teruraĵojn oni nur ne travivas ĉe tio. Mi neniam forgesos la dolorajn ĝemojn, trapenetrantajn ĝis la ostcerbo.

"Homoj, neniam malutilantaj unu al alia, mortigas sin reciproke kvazaŭ sovaĝaj bestoj, kaj la aĉaj sklavaj animoj miksas la bonan Dion kiel helpanton en tiun aferon.

"Al mia najbaro en la fronto la kuglo dispecigis makzelon. La malfeliĉulo freneziĝis de dolorego. Li kuradis kiel frenezulo, kaj dum somera brula varmego ne povis trovi akvon eĉ por freŝigi sian teruran vundon. Nia komandanto, kronprinco Friedrich (poste la nobla imperiestro Friedrich) skribis tiam en sia taglibro : "Milito estas ironio al Evangelio..."

La homoj ekkomprenas la patriotisman trompon, en kiu la registaroj tiel fervore penadas ilin reteni.

8.

"Sed kio okazos, se registaroj forestos?" oni diras ĝenerale.

- Okazos nenio ; foriĝos nur tio, kio jam longe estis nenecesa, sekve superflua kaj malbona ; foriĝos nur tiu organo, kiu fariĝis ne nur nenecesa, sed eĉ malutila.

"Sed se forestos registaroj, la homoj perfortos kaj mortigos unu la alian," oni diras ĝenerale.

- Kial ? Kial la forigo de tiu organizo, kiu aperis per perforto kaj estas transdonata

de generacio al generacio por fari perforton, kial la forigo de tia perdinta uzon organizo kaŭzos, ke la homoj perfortos kaj mortigos unu la alian ? Ŝajnas, kontraŭe, ke la forigo de perfortorgano kaŭzos tion, ke la homoj ĉesos perforti kaj mortigi unu la alian.

Nun estas homoj speciale edukataj, pretigataj por mortigadi kaj perfortadi aliajn homojn, - homoj, al kiuj estas aljuĝata rajto perfortadi, kaj kiuj uzas ekzistantan por tio organizon ; kaj tia perfortado kaj mortigado estas konsiderata kiel bona kaj heroa afero. Tiam la homoj ne estos por tio edukataj, neniu havos la rajton perfortadi aliajn, estos nenia organizo por perfortado, kiel tion ni havas en la nuntempo ; perfortado kaj mortigado estos ĉiam konsiderataj kiel malbonaĵo.

Se ankaŭ post la forigo de registaroj okazados perfortadoj, estas evidente, ke ili estos pli malgrandaj, ol tiuj, kiuj estas farataj nun, kiam ekzistas speciale por perfortado konstruitaj organizoj kaj situacioj, ĉe kiuj la perfortado kaj mortigado estas konsiderataj kiel profitdona kaj utila afero.

La forigo de registaroj forigos nur tradician nenecesan organizon por perfortado kaj ĝian senkulpigon.

"Estos nek leĝoj, nek propreco, nek juĝejoj, nek polico, nek popola instruado", diras oni kutime, intence konfuzante la perfortadojn de potenco kun diversaj sociaj agoj.

La forigo de registarorganizoj, fonditaj por perfortadi homojn, neniel kaŭzas la forigon de tio, kio estas prudenta kaj utila, sekve neperforta en leĝoj, propreco, policaj limigoj, financa ordo, popola instruado. Kontraŭe, la foresto de maldelikata registara potenco, celanta subteni nur sin mem, ebligos pli racian kaj justan socian organizon, nebezonantan per-

fortadon. La justico, la publikaj sociaj aferoj kaj la popola instruado, ĉio ĉi estos en tia mezuro, en kia tio estas necesa al popoloj, kaj en tia formo, kia ne entenas malbonon kunigitan kun la nuna registara organizo ; malaperos nur tio, kio estis malbona kaj malhelpis liberan elmontron de popola volo.

Sed eĉ se allasi, ke ĉe foresto de registaro okazos senordeco kaj internaj kunpuŝiĝoj, eĉ tiam la stato de popoloj estos pli bona ol nun. La nuna stato de popoloj estas tia, ke estas malfacile imagi ĝian plimalboniĝon. La popolo estas elĉerpita, kaj la elĉerpiĝo devas progresadi fortiĝante. Ĉiuj viroj fariĝis militaj sklavoj kaj ĉiuminute devas atendi la ordonon mortigi aŭ esti mortigataj. Kion ankoraŭ atendi ? Tion, ke la elĉerpitaj popoloj komencu morti de malsato ? Tio jam komenciĝas en Rusio, Italio kaj Hindio. Aŭ tion, ke oni krom viroj prenu en militservon ankaŭ virinojn ? En Transvalo tio jam komenciĝas.

Sekve, se la foresto de registaroj eĉ vere signifus anarkion en la nea, senorda signifo de tiu vorto (kion ĝi tute ne signifas), tiel eĉ tiam nenia anarkia senordeco estos pli malbona ol tiu situacio, ĝis kiu la registaroj alkondukis siajn popolojn, kaj al kiu ili kondukas ilin.

Tial ne povas neutili por la homoj la liberiĝo el patriotismo kaj la forigo de la sur ĝi staranta registara despotismo.

9.

Ekkonsciu, homoj, kaj pro ĉiu via korpa kaj spirita bono kaj pro tiu de viaj fratoj kaj fratinoj, haltu, pripensu, kion vi faras!

Ekkonsciu kaj komprenu, ke viaj malamikoj estas nek buroj, nek angloj, nek francoj, nek germanoj, nek ĉeĥoj, nek finnoj, nek

rusoj, sed viaj malamikoj, nuraj malamikoj estas vi mem per via patriotismo subtenantaj la registarojn, kiuj vin premas kaj kaŭzas viajn malfeliĉojn.

Ili prenis sur sin defendi vin kontraŭ danĝero kaj tiun kvazaŭan situacion alkondukis ĝis tio, ke vi ĉiuj fariĝis soldatoj, sklavoj, ĉiuj elĉerpitaj, kaj tiu elĉerpiĝo ĉiam progresas, kaj ĉiun minuton vi povas kaj devas atendi, ke la streĉita kordo rompiĝos kaj komenciĝos terura mortigo de vi kaj de viaj infanoj.

Kiel ajn estus tiu mortigado kaj per kio ajn ĝi finiĝos, la situacio restos la sama. Tiel same kaj eĉ kun pli granda streĉiteco la registaroj armos kaj ruinigos, malmoraligos vin kaj viajn infanojn, kaj haltigi tion, malhelpi tion neniu helpos al vi, se vi mem ne helpos vin.

La helpo konsistas nur en unu, en la forigo de tiu terura ĉeniĝo de perfortkonuso, ĉe kiu tiu(j), kiu(j) sukcesas suprenrampi ĝis la pinto de tiu konuso, potencas la tutan popolon, kaj des pli certe potencas, ju pli kruela kaj malhumana (i)li estas, kiel ni tion scias laŭ tiuj Napoleono, Nikolao Ia, Bismarko, Ĉamberleno, Rodso kaj diktatoroj regantaj la popolojn en cara nomo.

Por forigi tiun ĉeniĝon estas ununura rimedo - vekiĝo el patriotisma hipnoto.

Komprenu, ke ĉiun tiun malbonon, kiun vi suferas, vi mem faras al vi, submetante vin al tiuj influoj, per kiuj vin trompas la imperiestroj, reĝoj, parlamentanoj, regantoj, militistoj, kapitalistoj, pastraro, verkistoj, artistoj, - ĉiuj, al kiuj estas necesa tiu patriotisma trompo, por ke ili povu vivi per viaj laboroj.

Kiu ajn vi estas - franco, ruso, polo, anglo, irlandano, germano, ĉeĥo - komprenu, ke ĉiuj viaj veraj homaj interesoj, kiaj ajn ili

estas - terkulturaj, industriaj, komercaj, artaj aŭ sciencaj - ĉiuj ĉi interesoj, kiel ankaŭ plezuroj kaj ĝojoj, neniel kontraŭas al interesoj de aliaj popoloj kaj ŝtatoj, kaj ke vi estas ligitaj per reciproka kunagado, per interŝanĝo de servoj, per ĝojo de ampleksa, frata komunikiĝado, la interŝanĝo ne nur de komercaĵoj, sed ankaŭ de pensoj kaj sentoj kun homoj de aliaj popoloj.

Komprenu, ke la demando pri tio, al kiu sukcesis perfortpreni Vej-Haj-Vej, Port Arthur aŭ Kubo, al via registaro aŭ al alia, por vi estas ne nur egala, sed ĉiu tia perfortpreno farita de via registaro malutilas al vi, ĉar ĝi nepre kaŭzas diversajn influojn de via registaro al vi, por devigi vin partopreni en rabadoj kaj perfortadoj, necesaj por perfortpreno kaj ĝia reteno. Komprenu, ke via vivo neniel povas pliboniĝi per tio, ĉu Alzaco estos germana aŭ franca, kaj ĉu Irlando kaj Polio estos liberaj aŭ subpremataj ; kies ajn ili estus, vi povas loĝi, kie vi volas ; eĉ se vi estus alzacano, irlandano aŭ polo, komprenu, ke ĉia disflamigo de patriotismo nur malbonigos vian situacion, ĉar tiu mallibero, en kiu estas via popolo, devenis de batalo inter patriotismoj, kaj ĉiu elmontro de patriotismo en iu popolo elvokas reakcion kontraŭ ĝi en alia. Komprenu, ke liberiĝi de ĉiuj viaj mizeroj vi povas nur kiam vi liberiĝos de kaduka patriotisma ideo kaj de kuŝanta sur ĝi submetiĝo al registaroj, kaj kiam vi kuraĝe aliĝos al tiu plej alta ideo de frata unuiĝo de popoloj, kiu jam longe eniris vivon kaj de ĉiuj flankoj vokas vin al si.

Homoj nur ekkomprenu, ke ili estas filoj ne de iuj ajn patrujoj aŭ registaroj, sed filoj de Dio, kaj tial povas esti nek sklavoj, nek malamikoj de aliaj homoj, - kaj per si mem foriĝos tiuj frenezaj, jam per nenio necesaj, de antikveco restintaj institucioj, nomataj registaroj ; kaj ĉiuj tiuj suferoj, perfortadoj, humiligoj kaj krimoj, kiujn ili portas en si.

***

# AL POLITIKISTOJ

> La plej pereiga eraro, kiu iam ajn estis farita en la mondo, estis la apartigo de la politika scienco dis-de la morala.
>
> Shelley

En mia alvoko al la laborista popolo mi eldiris la penson, ke, por ke la laboristoj povu liberiĝi de sia subpremo, ili mem devas ĉesi vivi tiel, kiel ili vivas nun, batalante kontraŭ proksimuloj pro sia persona bono, kaj vivi laŭ evangelia regulo - "konduti je aliaj tiel, kiel vi volas, ke oni kondutu je vi."

Tiu ĉi de mi proponita rimedo elvokis, kiel mi ankaŭ atendis, unu kaj tiun saman juĝon aŭ pli vere kondamnon de homoj kun plej diversaj konvinkoj.

"Utopio, nepraktike. Atendi por liberigo de homoj suferantaj de subpremo kaj perforto, ke ili ĉiuj fariĝu virtaj, signifas, rekonante la ekzistantan malbonon, trudi al si senagemon."

Kaj jen mi ekvolis diri kelkajn vortojn pri tio, kial mi opinias, ke tiu ĉi penso ne estas tiel nepraktika, kiel tio ŝajnas, sed kontraŭe meritas ke sur ĝin estu turnita la atento pli ol sur ĉiujn aliajn de scienculoj proponatajn rimedojn por plibonigo de la socia organizo, - diri tion ĉi al tiuj homoj, kiuj sincere, ne per vortoj, sed per ago volas servi al proksimulo.

Al tiuj homoj mi turnas min nun.

1.

Ŝanĝiĝas la idealoj de socia vivo gvidantaj la homan agadon, kaj kun ilia ŝanĝo ŝanĝiĝas ankaŭ la vivordo de homoj. Estis tempo, kiam la idealo de socia vivo estis plena animala libereco, dum kiu laŭ mezuro de sia forto iuj homoj en rekta kaj metafora senco formanĝadis aliajn. Poste venis la tempo, kiam socia idealo fariĝis potenco de unu, kaj la homoj adoradis estrantojn kaj ne nur volonte sed eĉ entuziasme obeadis al ili - Egiptujo, Romujo : "Morituri te salutant". Poste la homoj ekkomprenis la idealon de tia vivorganizo, ĉe kiu la estreco estis rekonata ne kiel memcelo, sed por ordigo de vivo de homoj. La provoj efektivigi tiun idealon estis iam la tutmonda monarkio, poste tutmonda eklezio unuiganta diversajn ŝtatojn kaj gvidanta ilin, poste aperis idealo de konstitucioj, poste de respublikoj kun ĝenerala kaj sen ĝenerala balotrajto. Nun oni opinias, ke tiu idealo povas esti efektivigita per tia ekonomia organizo, ĉe kiu ĉiuj laboriloj ĉesos esti privata propraĵo kaj fariĝos propraĵo de tuta popolo.

Kiom ajn diversspecaj estas ĉi tiuj idealoj, por efektivigi ilin ĉiam estis supozata potenco, t.e. deviga forto, deviganta homojn plenumadi la starigitajn leĝojn. Tio sama estas supozata ankaŭ nun.

Supoziĝas, ke la efektivigo de plej granda bono de ĉiuj estas atingata per tio, ke unuj homoj (laŭ ĉina doktrino la plej virtaj, laŭ eŭropa doktrino sanktoleitoloj aŭ elektitoj de popolo), ricevinte potencon, starigas kaj subtenas tian ordon, ĉe kiu estas atingata por la regnanoj la plejeble granda sekureco kontraŭ reciprokaj perfortdeziroj je laboro, libero kaj vivo unu de alia. Ne nur la homoj rekonantaj la ŝtatan organizon kiel necesan kondiĉon

de homa vivo, sed ankaŭ revoluciuloj kaj socialistoj, kvankam konsiderantaj la ekzistantan ŝtatorganizon bezonanta ŝanĝon, rekonas tamen potencon, t.e. rajton kaj eblon de iuj homoj devigadi aliajn plenumadi la starigitajn leĝojn, kiel necesan kondiĉon por bona organizo de socio.

Tiel estis en antikvaj tempoj, tiel estas ankaŭ nun. Sed la homoj, perforte devigataj submetiĝi al certaj ordoj, ne ĉiam rekonis tiujn ordojn plej bonaj kaj tial ofte ribeladis kontraŭ estrantoj, forigadis ilin kaj starigadis sur lokon de antaŭaj siajn novajn ordojn, kiuj, laŭ ilia opinio, sekurigis pli grandan bonon por homoj. Sed ĉar la homoj posedantaj potencon ĉiam malmoraliĝadis pro tiu posedo kaj tial uzis la potencon ne tiom por komuna bono, kiom por sia persona, tial ĉiam la nova estraro estis tia sama, kiel la antaŭa kaj ofte ankoraŭ pli maljusta.

Tiel estis, kiam la ribelantoj kontraŭ la ekzistanta potenco venkis ĝin. Sed kiam la venko restis sur flanko de ekzistanta estraro, la triumfinta estraro por sekurigi sin ĉiam fortikigis la rimedojn por sia defendo kaj fariĝis ankoraŭ pli premanta la liberon de siaj regnanoj.

Tiel tio estis en antikveco kaj en nova tempo, kaj tiel same okazis en nia eŭropa mondo dum la tuta XIXa jarcento. En la unua duono de tiu ĉi jarcento la revolucioj estis plejparte sukcesaj, sed la novaj registaroj, anstataŭintaj malnovajn : Napoleono Ia, Karlo Xa, Napoleono IIIa, ne pligrandigis la liberon de regnanoj. Kaj dum la dua duono, post la jaro 1848, ĉiuj provoj de revolucioj estis subpremataj de la registaroj ; kaj pro la antaŭaj revolucioj kaj pro la provoj de novaj la registaroj defendante sin pli kaj pli dank'al teknikaj eltrovoj de pasinta jarcento, donintaj la

antaŭe neekzistintan potencon sur la naturo kaj unu sur alia, plifortigis sian potencon kaj fine de l'pasinta jarcento alkondukis ĝin ĝis tia grado, ke la popola batalo kontraŭ ili fariĝis neebla. La registaroj kaptis en siajn manojn ne nur grandegajn riĉaĵojn, kiujn ili kolektas de l'popolo, ne nur la disciplinitajn, arte kolektatajn militistarojn, sed ankaŭ ĉiujn spiritajn rimedojn influi la popolamasojn : la gvidon de gazetaro, de religia direkto kaj, ĉefe, la edukadon. Kaj tiuj ĉi rimedoj estas tiom organizitaj kaj tiom potencaj, ke de la jaro 1848 en Eŭropo okazis neniu sukcesa provo de revolucio.

2.

Tiu ĉi fenomeno estas tute nova kaj propra nur al nia tempo. Kiom ajn potencaj estis Nerono, Ĝingis-Ĥano, Karlo la Granda, ili ne povis subpremadi la ribelojn sur la limoj de siaj regnoj, kaj des malpli gvidi la spiritan agadon de siaj regatoj, ilian klerigadon, edukadon, religian direkton. Kaj nun ĉiuj rimedoj por ĉi tio troviĝas en manoj de registaroj.

Ne nur la pariza makadamo, anstataŭinta la ŝtonojn de pavimoj, malebligis la barikadojn dum revolucioj en Parizo (tiaj "makadamoj" en la lasta duono de l'XIXa jarcento aperis en ĉiuj fakoj de ŝtata administro : la kaŝa polico, spionado, subaĉetoj de gazetaro, fervojoj, telegrafoj, telefonoj, fotografaĵoj, malliberejoj, fortikaĵoj, grandegaj riĉaĵoj, la edukado de junaj generacioj kaj, ĉefe, la militistaro), troviĝas en la manoj de la registaro.

Kaj ĉio estas tiel organizita, ke la plej sentalentaj, malsaĝaj regantoj preskaŭ reflekse, el sento de memkonservo, neniam allasos seriozajn preparojn al ribelo kaj ĉiam sen ia streĉiĝo subpremos tiujn malfortajn provojn

de malkaŝa ribelo, kiujn malofte ankoraŭ faras postrestintaj revoluciuloj, per tiuj provoj nur fortigantaj la potencon de la registaroj.

La sola rimedo por nuntempe venki la registaron prezentiĝas en tio, ke la militistaro, formita el homoj de popolo, ekkompreninte la maljustecon, kruelecon kaj malutilon por si de registaro, ĉesu subtenadi ĝin. Sed ankaŭ en tiu ĉi rilato la registaroj, sciante, ke ilia ĉefa forto konsistas en militistaro, tiel organizis ĝian kompletigon kaj disciplinon, ke nenia propagando en popolo povas elŝiri la militistaron el la manoj de la registaroj. Neniu homo, troviĝanta en militistaro kaj submetiĝinta al tiu hipnotiga ekzercado, nomata disciplino, malgraŭ iaj ajn politikaj konvinkoj, troviĝante en fronto, ne povas ne obei al komando, tiel same, kiel ne povas ne palpebrumi la okulo, sur kiun estas celata la frapo. Kaj la dudekjaraj knaboj, kiuj estas kolektataj por militservo, kaj estas edukitaj en mensoga eklezia aŭ materialisma kaj krome patriota direkto, ne povas rifuzi la militservon, kiel ne povas ne obei la infanoj, kiam oni sendas ilin en lernejon. Kaj enarmeiĝinte, tiuj ĉi junuloj, kiajn ajn konvinkojn ili havus, dank'al arta disciplino dum jarcentoj ellaborita, dum unu jaro neeviteble estas transformataj en obeemajn ilojn de la estraro. Eĉ se okazas maloftaj okazoj - nur unu el dekmilo - de rifuzo de militservo, tion faras nur la t.n. sektanoj, agantaj tiel pro religiaj konvinkoj, kiujn ne rekonas la registaroj. Sekve, dum nia tempo en eŭropa mondo, se la registaro volas reteni sian potencon (kaj ĝi ne povas ne voli tion, ĉar la forigo de potenco kaŭzas pereon de regantoj), nenia serioza ribelo povas organiziĝi, kaj eĉ se organiziĝos io tia, ĝi estos subpremata kaj havos neniajn aliajn sekvojn, ol la pereon de multaj facilpensaj homoj kaj la fortigon de registara potenco. Tion povas ne vidi la revoluciuloj, socialistoj,

gvidataj per postrestintaj tradicioj kaj entuziasmiĝintaj per batalo fariĝinta por kelkaj difinita profesio, sed ne povas ne vidi ĉiuj homoj libere rigardantaj la historiajn okazaĵojn.

Tiu ĉi fenomeno estas tute nova kaj tial ankaŭ la agado de la homoj dezirantaj ŝanĝi la ekzistantan ordon, devas konsideri tion ĉi novan en eŭropa mondo, la situacion de la ekzistanta estreco.

3.

La dum multaj jarcentoj kondukita batalo inter registaro kaj popolo komence rezultigis ŝanĝon de unu registaro per alia, kaj tiu alia per tria, ktp. De duono de la pasinta jarcento en nia eŭropa mondo la potenco de la ekzistantaj registaroj, dank'al teknikaj perfektigoj de nia tempo, ĉirkaŭigis sin per tia defendo, ke la perforta batalo kontraŭ ĝi fariĝis neebla. Kaj laŭ mezuro de tio, ke la registaro atingis pli kaj pli altan gradon de forto, ĝi pli kaj pli elmontris sian malpravecon : ĉiam pli kaj pli evidenta fariĝis la interna kontraŭdiro, entenata en la kompreno pri bonfareco de aŭtoritato kaj de perforto, faranta la esencon de ĉia estreco ; evidentiĝis, ke la aŭtoritato, por esti bonfara, devus troviĝadi en manoj de plej bonaj homoj, sed fakte ĉiam troviĝadis en manoj de pli malbonaj homoj, ĉar la pli bonaj homoj pro la eco de estreco, konsistanta en uzo de perforto kontraŭ proksimulo, ne povis deziri estrecon kaj neniam akiradis kaj retenadis ĝin.

Tiu kontraŭdiro estas tiel evidenta, ke ŝajnas, ke ĉiuj homoj ĉiam devis ĝin vidi. Kaj tamen la solena ĉirkaŭaĵo de estraro, timo, ekscitata de ĝi, kaj la inerteco de tradicio estis tiel potencaj, ke pasis jarcentoj, jarmiloj, antaŭ ol la homoj ekkomprenis sian erariĝon. Nur en la lasta tempo la

homoj ekkomprenis - malgraŭ la tuta soleneco, per kiu ĉiam ĉirkaŭiĝas sin la estraro -, ke ĝia esenco konsistas en minaco al homoj per senigo de propraĵo, libero, vivo kaj en plenumado de tiuj ĉi minacoj, kaj ke tial la homoj, kiuj, kiel reĝoj, imperiestroj, ministroj, juĝistoj kaj aliaj dediĉas sian vivon al tiuj ĉi aferoj sen ia alia motivo, ol la deziro reteni sian altan situacion, - ne nur ne estas la plej bonaj, sed ĉiam malbonaj homoj. Kaj estante tiaj, ili ne povas per sia potenco kunhelpi al la bono de la homoj, sed, kontraŭe ĉiam estis kaj plu estas unu el la ĉefaj kaŭzoj de la sociaj mizeroj de la homaro. Kaj tial la estreco, kiu antaŭe elvokadis en la popolo ravon kaj sindonon, nun en pli granda kaj pli bona parto de la homoj elvokas ne nur indiferenton, sed ofte malestimon kaj malamon. Tiu ĉi kleriĝinta parto de la homoj komprenas nun, ke tiu ĉi tuta solena ĉirkaŭaĵo, per kiu ĉirkaŭiĝas sin la estraro, estas nenio alia, ol la ruĝa ĉemizo kaj pluŝaj pantalonoj de ekzekutisto, distingantaj lin de aliaj malliberejservantoj pro tio, ke li prenas sur sin la plej malmoralan kaj abomenindan aferon: mortpuni homojn.

Konsciante tian en popolo pli kaj pli disvastiĝantan rilaton al si, la estraro en nia tempo ne plu apogas sin sur spiritaj principoj (sanktoleumo, elekto de popolo aŭ de sanktaj homoj), sed tenas sin nur per perforto. Kaj tenante sin nur per perforto, la estreco pro tio ankoraŭ pli perdas la konfidon de la popolo. Kaj perdante konfidon, ĝi estas devigata alkuri al ĉiam pli granda kapto de ĉiuj elmontroj de la popola vivo kaj pro tiu ĉi kapto ĝi elvokas ankoraŭ pli grandan malkontenton pri si.

4.

La potenco fariĝis nedetruebla kaj tenas sin ne plu per prudentaj principoj de sankt-

oleumo, elekto, reprezentado, sed tenas sin nur per forto. Kaj kune kun tio la popolo ĉesas kredi je aŭtoritato kaj estimi ĝin kaj obeas al ĝi nur tial, ĉar neeblas fari alie.

Kaj jen de duono de la pasinta jarcento, de tiu sama tempo, kiam la estreco fariĝis nedetruebla kaj perdis samtempe sian pravigon kaj imponecon en popolo, inter la homoj ekmontriĝas la doktrino, ke la libero - ne tiu fantazia libero, kiun predikas la anoj de perforto, certigante, ke la homo devanta pro timo de puno plenumadi la ordonojn de aliaj homoj estas libera, - sed tiu unika kaj vera libero, kiu konsistas en tio, ke ĉiu homo povas vivi kaj konduti laŭ propra kompreno, pagi aŭ ne pagi impostojn, militservi aŭ ne, amiki aŭ malpaci kun najbara popolo, - ke tia vera libero estas neakordiĝebla kun ia ajn estreco de unuj homoj super aliaj.

Laŭ tiu ĉi doktrino la estreco ne estas, kiel oni pensis antaŭe, io dieca kaj grandioza, nek nepra kondiĉo de socia vivo, sed estas nur sekvo de kruda perforto de unuj homoj kontraŭ aliaj. Ĉu tiu estreco troviĝas en la manoj de Ludoviko XVIa aŭ de komitato de socia savo, direktorio, aŭ de konsularo, Napoleono, aŭ Ludoviko XVIIIa, sultano, prezidanto, bogdiĥano, aŭ de ĉefministro, - ĉie, kie ekzistos la estreco de unuj homoj super aliaj, forestos la libero kaj estos la subpremado de iuj homoj er aliaj. Kaj tial la estreco devas esti forigita.

Sed kiel forigi ĝin ? Kaj kiel, foriginte la estrecon, aranĝi tiel, ke la homoj sen estreco ne revenu al sovaĝa stato de kruda perforto de unu super alia ?

Ĉiuj anarkiistoj, kiel estas nomataj la predikantoj de tiu ĉi doktrino, tute konsente inter si respondas al la unua demando per tio, ke la estreco por esti vere forigita, devas

esti forigita ne per forto, sed per la konscio de la homoj pri senutilo kaj malutilo de la estraro. Sed al la dua demando : kiel devas esti organizita la socio sen estreco ? - la anarkiistoj respondas diverse.

La anglo Godwin, vivinta fine de la XVIIIa kaj komence de la XIXa jarcentoj, kaj franco Proudhon, skribinta en duono de la pasinta jarcento, al la unua demando respondas, ke, por forigi la estrecon sufiĉas la konscio de la homoj pri tio, ke la komuna bono (Godwin) kaj justeco (Proudhon) estas malplenumataj de estreco ; kaj ke, se disvastiĝus en popolo la konvinko, ke la komuna bono kaj justeco povas esti efektivigitaj nur ĉe foresto de estreco, la estreco per si mem foriĝos.

Al la dua demando : Kiamaniere sen estreco garantii la bonordon en socio, Godwin kaj Proudhon respondas, ke la homoj gvidataj per konscio pri komuna bono (laŭ Godwin) kaj justeco (laŭ Proudhon) nature trovos la plej prudentajn, justajn kaj por ĉiuj profitajn formojn de vivo.

Kaj la aliaj anarkiistoj, kiel Bakunin kaj Kropotkin, kvankam ankaŭ rekonas kiel rimedon por forigo de estreco la konscion de la popolamasoj pri ĝia malutilo kaj pri ĝia neakordiĝeblo kun la progreso de la homaro, konsideras tamen revolucion ebla kaj eĉ necesa, al kiu ili konsilas prepari homojn. Al la dua demando ili respondas, ke, tuj kiam estos detruitajla ŝtata organizo kaj la privata propraĵo, la homoj nature kunmetiĝos en prudentajn, liberajn kaj profitajn vivkondiĉojn.

Preskaŭ tiel same, kiel ankaŭ aliaj respondas al la demando pri rimedoj forigi la estrecon la germano Maks Stirner kaj la usona verkisto Tucker. Ili ambaŭ opinias, ke se la homoj komprenus, ke la persona intereso de

ĉiu homo servas kiel tute sufiĉa kaj leĝa gvidilo de homa konduto kaj ke la estreco nur malhelpas elmontriĝi en sufiĉa mezuro al tiu ĉi gvidanta principo de homa vivo, - la estreco per si mem foriĝus pro la neobeo al ĝi kaj, ĉefe, kiel diras Tucker, pro nepartopreno en ĝi. Kaj ilia respondo al la dua demando konsistas en tio, ke la homoj, liberigitaj de superstiĉo kaj neceso de estreco, sekvante nur la personan intereson, per si mem kunmetiĝos en plej ĝustajn kaj por ĉiu profitajn sociajn formojn de vivo.

Ĉiuj ĉi doktrinoj estas tute pravaj je tio, ke se la estreco devas esti forigita, tio povas fariĝi neniel per la forto, ĉar la potenco foriginta potencon restos potenco, sed tio povas fariĝi nur per klarigado de la konscio de la homoj pri tio, ke la estreco estas senutila kaj malutila, kaj la homoj devas nek obei al ĝi, nek partopreni en ĝi. Tiu ĉi vero estas nerefutebla : la estreco povas esti forigita nur per prudenta konscio de la homoj. Sed en kio devas konsisti tiu ĉi konscio ?

La anarkiistoj opinias, ke tiu ĉi konscio povas esti fondita sur la prikonsideroj pri komuna bono, justeco, progreso, aŭ sur persona intereso de la homoj. Sed sen paroli jam pri tio, ke tiuj ĉi principoj ne akordiĝas inter si, jam la difinoj mem de tio, en kio konsistas la komuna bono, justeco, progreso aŭ persona intereso, estos komprenataj de la homoj senfine diverse. Tial neeblas supozi, ke la homoj, malkonsentantaj inter si kaj diverse komprenantaj tiujn principojn, en kies nomo ili kontraŭstaras al estreco, povus forigi la tiel forte starantan kaj lerte sin defendantan estrecon. Kaj la supozo, ke la konsideroj pri komuna bono, justeco aŭ leĝo de progreso povas sufiĉi

por ke la homoj, liberiĝintaj de la estreco sed ne havantaj ian kaŭzon por oferi sian personan bonon al komuna bono, kunmetiĝu en justajn kondiĉojn ne forigantajn la reciprokan liberon, estas ankoraŭ pli nefundamentita. Kaj la utilisme-egoisma teorio de Maks Stirner kaj Tucker, asertantaj, ke la sekvo per ĉiu al sia persona intereso starigos justajn rilatojn inter ĉiuj, ne nur estas arbitra, sed ankaŭ tute kontraŭa al tio vere okazinta kaj plu okazanta.

Sekve, juste konsiderante kiel solan rimedon por forigi la estrecon la spiritan ilon, la anarkiisma doktrino, sin tenante je materialisma mondrigardado, ne havas tiun ĉi spiritan ilon kaj limiĝas per supozoj kaj revoj, donantaj al la defendantoj de perforto la eblon, dank'al malvereco de la supozataj rimedoj por efektivigo de doktrino, nei ĝiajn verajn principojn.

Kaj la spirita ilo estas nur unu, jam longe konata de la homoj, kiu ĉiam forigis estrecon kaj kiu ĉiam donis al la homoj uzantaj tiun rimedon plenan, per nenio depreneblan liberon. Tiu ĉi ilo estas nur unu : tia religia kompreno de vivo, ĉe kiu la homo konsideras sian teran vivon nur kiel partan elmontron de tuta vivo, ligas sian vivon kun senfina vivo kaj, rekonante sian plej supran bonon en plenumado de leĝoj de tiu ĉi senfina vivo, konsideras la plenumadon de tiuj ĉi leĝoj por si pli deva, ol la plenumado de iaj ajn homaj leĝoj.

Nur tia religia mondkompreno, unuiganta la homojn en egala kompreno de vivo, neakordiĝebla kun submetiĝo al estreco kaj kun partopreno en ĝi, vere forigas la estrecon.

Kaj mirinda afero, ke nur post tio, kiam la homoj estis per la vivo mem alkondukitaj al la konvinko, ke la ekzistanta estreco estas nedetruebla kaj nuntempe ne povas esti detru-

ata per forto, ili komprenis tiun ĝis ridindeco evidentan veron, ke estreco kaj ĉiu malbono de ĝi kaŭzata, estas nur sekvoj de malbona vivo de la homoj kaj ke tial por forigi la estrecon kaj la malbonon de ĝi kaŭzatan necesas bona vivo de la homoj.

La homoj ekkomprenas tion ĉi kaj nun ili devas kompreni ankoraŭ tion, ke por bona vivo de la homoj ekzistas ununura rimedo : konfeso kaj plenumado de religia doktrino, propreca kaj komprenebla al plimultaj homoj.

Nur per konfeso kaj plenumado de tia religia doktrino la homoj povas atingi tiun idealon, kiu aperis nun en ilia konscio kaj al kiu ili celas.

Kaj ĉiaj aliaj provoj forigi la estrecon kaj organizi sen estreco bonan vivon de homoj estas nur vana perdo de fortoj kaj ne alproksimigas, sed malproksimigas la homojn de tiu celo.

5.

Jen tion ĉi mi volis diri al vi, sinceraj homoj, kiuj, ne kontentiĝante per egoista vivo, deziras oferi siajn fortojn por servo al fratoj. Se vi partoprenas aŭ volas partopreni en ŝtata agado kaj tiamaniere servi al popolo, pripensu tion, kio estas ĉia registaro tenanta sin per potenco ? Stariginte al vi tiun ĉi demandon, vi ne povas ne vidi, ke ekzistas neniu registaro, kiu ne farus, ne preparus sin fari, ne apogus sin sur perfortoj., rabadoj , mortigadoj .

La malmulte konata usona verkisto Thoreau en sia traktato pri tio, kial la homo devas malobei al registaro, rakontas, kiel li rifuzis pagi al la usona registaro unu dolaron da impostoj, klarigante sian konduton per tio, ke li ne volas per sia dolaro partopreni en

agoj de registaro permesanta la sklavecon de negroj. Ĉu ne tion saman povas kaj devas senti rilate al sia registaro mi ne diras jam rusa homo, sed la regnano de plej progresa Ŝtato de Ameriko kun ĝiaj krimoj en Kubo, Filipinoj, rilato al negroj, elpelo de ĉinoj, aŭ de Anglio kun ĝia opio, buroj, aŭ de Francio kun ĝiaj teruroj de militarismo ?

Kaj tial la sincera homo deziranta servi al la homoj, se li nur serioze klarigis al si, kio estas ĉia registaro, ne povas partopreni en ĝi alie, ol nur apogante sin sur la regulo, ke la celo pravigas la rimedojn.

Sed tia agado ĉiam estis malutila por tiuj, pro kiuj ĝi estis entreprenata, tiel ankaŭ por tiuj, kiuj fordonis sin al ĝi.

La afero estas ja tre simpla. Vi volas, submetiĝante al registaro, uzante ĝiajn leĝojn, demiliti de ĝi pli grandan liberon kaj rajtojn por popolo. Sed la libero kaj rajtoj de popolo estas kontraŭproporciaj al potenco de registaro, ĝenerale de la regantaj klasoj. Ju pli da libero kaj da rajtoj havas la popolo, des malpli da estreco kaj da profito de ĝi havos la registaro. La registaroj scias tion ĉi kaj havante en siaj manoj la potencon, volonte allasas ĉiaspecan liberalan babilaĵon kaj eĉ kelkajn malgravajn liberalajn reformojn, praviganta jn ilian estrecon, sed tuj per forto ĉesigas tiajn liberalajn provojn, kiuj minacas ne nur al profitoj de regantoj, sed al ilia ekzisto mem. Sekve, ĉiuj viaj penadoj per estreco de administrado aŭ per parlamentoj servi al popolo alkondukos vin nur al tio, ke vi per via agado fortigos la potencon de la regantaj klasoj kaj laŭ grado de via sincereco senkonscie aŭ konscie vi partoprenos en ĝi. Tiel estas pri la homoj volantaj servi al la popolo per ekzistantaj Ŝtataj institucioj.

Se vi apartenas al sinceraj homoj, dezirantaj servi al la popolo per revolucie-socialista agado, tiam, sen paroli pri nesufiĉo de tiu celo de materiala, neniam iun kontentiganta bonstato de homoj, kiun vi celas, vi pensu ankaŭ pri tiuj rimedoj, kiujn vi havas por atingi ĝin. Tiuj rimedoj estas, unue kaj ĉefe, senmoralaj, inkluzivantaj mensogon, trompon, perforton, mortigadon ; due, tiuj ĉi rimedoj neniam atingas la celon. La forto kaj singardo de la registaroj defendantaj sian ekziston en nia tempo estas tiel grandaj, ke ĉiuj ruzoj, trompoj, kruelaĵoj, ne nur ne forigos, sed eĉ ne ekskuos ilin. Ĉiuj provoj de revolucioj nun nur donas novajn pravigojn por la perforto de la registaroj kaj pligrandigas ilian potencon.

Sed eĉ se allasi la neeblaĵon, ke la revolucio en nia tempo estus kronata per sukceso, tiam, unue, kial pensi, ke kontraŭ tio, kio ĉiam okazadis, la potenco, detruinta potencon, pliigus la liberon de la homoj kaj fariĝus pli bonfara ol tiu, kiun ĝi forigis ? Due, eĉ se estus ebla la supozo - kontraŭa al sana senco kaj sperto - ke la potenco foriginta potencon donus la liberon al homoj starigi la vivoformojn tiajn, kiajn ili konsideras por si la plej utilaj, ni havas nenian fundamenton pensi, ke la homoj, vivantaj egoistan vivon, starigus inter si pli bonajn vivkondiĉojn ol la antaŭaj.

La reĝino de dagomanoj eldonu la plej liberalan konstitucion kaj efektivigu tiun, laŭ opinio de socialistoj, savantan la homojn de ĉiuj iliaj mizeroj, komunigon de laboriloj, - estos necese, ke iu ajn posedu potencon, por ke estu plenumata la konstitucio kaj la laboriloj ne estu kaptataj en privatajn manojn. Kaj ĉar tiuj homoj estos dagomanoj kun sia mondkompreno, estas evidente, ke kvankam en alia formo, la perforto de iuj dagomanoj

kontraŭ aliaj estos la sama, kiel sen konstitucio kaj sen komunigo de laboriloj. Antaŭ ol efektivigi la socialisman organizon necesas, ke dagomanoj perdu emon al sangaj oferoj. Precize tio sama estas necesa ankaŭ por eŭropanoj.

Por ke la homoj povu vivi komunan vivon, ne subpremante unu la alian, estas necesaj ne institucioj subtenataj per forto, sed tia morala stato de la homoj, ĉe kiu la homoj laŭ sia interna konvinko, sed ne pro devigo, kondutu je aliaj tiel, kiel ili volas, ke oni kondutu je ili. Kaj tiaj homoj ekzistas. Ili ekzistas en religiaj kristanaj komunumoj en Usono, Rusio, Kanado, tiaj homoj vere vivante sen leĝoj, subtenataj per la forto, vivas komunan vivon, ne subpremante unu la alian.

Kaj tial estas nur unu agado prudenta kaj propra al homoj de nia tempo kaj de nia kristana socio : konfeso kaj predikado per vorto kaj ago de la lasta kaj plej alta al ni konata religia doktrino, kristana doktrino, ne tiu kristana doktrino, kiu, submetiĝante al la ekzistanta vivordo, postulas de la homoj nur plenumadon de eksteraj ceremonioj kaj kontentiĝas per kredo kaj prediko pri savo per elaĉeto, sed de tiu viva kristaneco, kies nepra kondiĉo estas ne nur nepartopreno en aferoj de registaro, sed neobeo al ĝiaj postuloj, ĉar tiuj postuloj - de impostoj kaj doganoj ĝis juĝejoj kaj militoj - ĉiuj estas kontraŭaj al vera kristaneco.

Kaj se estas tiel, tiam estas evidente, ke ne sur starigon de novaj formoj devas esti direktita la agado de homoj dezirantaj servi al proksimulo, sed sur ŝanĝon kaj perfektigadon de ecoj kiel siaj, tiel ankaŭ de aliaj homoj.

La homoj agantaj kontraŭ tio ĉi kutime pensas, ke samtempe povas perfektiĝi la vivoformoj,

la ecoj kaj la mondrigardadon de la homoj. Sed tiel agante, la homoj faras la kutiman eraron, akceptante la sekvon por kaùzo kaj la kaùzon por sekvo aù la akompanan fenomenon.

La ŝanĝo de ecoj kaj de mondrigardado de homoj neeviteble trenas post si la ŝanĝon de tiuj formoj, en kiuj vivis la homoj ; kontraùe, la ŝanĝo de vivoformoj ne nur ne kunhelpas al ŝanĝo de ecoj kaj de mondrigardado de homoj, sed plej multe malhelpas tiun ĉi ŝanĝon, direktante sur malĝustan vojon la atenton kaj agadon de la homoj. Ŝanĝi la vivoformojn, esperante tiamaniere ŝanĝi la ecojn kaj mondrigardadon de la homoj signifas la samon, kiel la transmetado je diversaj manieroj de malsekaj lignoj en forno, esperante, ke ekzistas tia aranĝo de malsekaj lignoj, ĉe kiu ili ekbruliĝos. Ekbruliĝos nur sekaj lignoj sendepende de tio, kiel ili estas kunmetitaj.

Tiu ĉi erariĝo estas tiel evidenta, ke la homoj ne povus submetiĝi al ĝi, se ne ekzistus kaùzo, eniganta ilin al tiu ĉi trompo. La kaùzo konsistas en tio, ke la ŝanĝo de homaj ecoj devas komenciĝi per si mem kaj postulas multe da batalo kaj peno ; male, la ŝanĝo de vivoformoj de aliaj estas farata facile, sen interna laboro sur si mem kaj havas ŝajnon de tre grava, granda agado.

Jen kontraù tiu ĉi erariĝo, fonto de grandega malbono, mi avertas vin, homojn sincere volantajn per via vivo servi al proksimulo.

6.

"Sed ni ne povas trankvile vivi, okupiĝante per konfeso kaj predikado de kristaneco, kiam ni vidas ĉirkaù ni suferantajn

homojn. Ni volas ageme servi al ili. Ni estas pretaj oferi niajn penadojn, eĉ nian vivon por tio ĉi," diras la homoj kun pli-malpli sincera indigno.

Sed kial vi scias, respondus mi al tiaj homoj, ke vi estas alvokitaj servi al homoj nepre per tiu maniero, kiu ŝajnas al vi la plej utila kaj efika ? Tio do, kion vi diras, montras nur, ke vi jam decidis, ke servi al homaro per kristana vivo estas neeble kaj ke la vera servado estas nur la servado per politika agado, kiu allogas vin.

Sed ja ĉiuj politikistoj tiel pensas kaj ili ĉiuj malpacas inter si kaj tial certe ne ĉiuj estas pravaj. Estus tre bone, se ĉiu povus servi al homoj tiel, kiel plaĉas al li, sed tiel ja ne estas, male ekzistas nur unu rimedo servi al homoj kaj plibonigi ilian staton. Tiu sola rimedo konsistas en konfeso kaj plenumado de tia doktrino, el kiu elfluas la interna laboro de memperfektigado. Kaj la memperfektigado de vera kristano, ĉiam nature vivanta inter la homoj kaj ne foriĝanta de ili, konsistas en starigo de pli bonaj, pli kaj pli amaj rilatoj inter si kaj aliaj homoj. Kaj la starigo de amaj rilatoj inter homoj ne povas ne plibonigi la ĝeneralan situacion de homoj, kvankam la formo de tiu pliboniĝo restas nekonata al homoj.

Estas vere, ke servante per registara, parlamenta aŭ revolucia agado ni antaŭen difinas la rezultojn, kiujn ni volas atingi, kaj ĉe tio ni povas ĝui ĉiujn profitojn de agrabla, luksa vivo kaj akiri brilan situacion, aprobon de homoj kaj grandan gloron. Eĉ se la partoprenantoj en tia agado iafoje devas suferi, tiu eblo de suferado estas tia, ke ĝi, kiel ankaŭ en ĉiu batalo, estas rekompencata per la eblo de sukceso. En militista agado prezentiĝas ankoraŭ pli da eblo de suferoj kaj eĉ de morto, kaj tamen nur la plej malmulte moralaj kaj

egoistaj homoj elektas ĝin.

Kontraŭe, la religia agado unue ne montras al ni tiujn rezultojn, kiujn ni atingas, due tiu agado postulas abnegacion de ekstera sukceso kaj ne nur ne prezentas brilan situacion kaj gloron, sed kondukas homojn al plej malsupra en ĝenerala senco situacio, elstarigas ilin ne nur al malestimo kaj kondamno, sed al plej kruelaj suferoj kaj morto.

Ekzemple, en nia tempo de ĝenerala deviga militservo la religia agado devigas ĉiun homon alvokatan servi al mortigo, suferi ĉiujn punojn, per kiuj punas la registaro pro la rifuzo militservi. Kaj tial la religia agado estas malfacila, sed nur ĝi sola donas al homo la konscion de vera libero, la certecon, ke li faras tion, kion li devas fari.

Kaj pro tio nur tiu ĉi agado estas vere fruktodona, atinganta krom siaj superaj celoj ankaŭ akompane per plej natura kaj simpla maniero tiujn rezultojn, kiujn per tiel artifikaj rimedoj celas la sociaj agantoj.

Sekve, la rimedo por servi al la homoj estas nur unu : oni devas mem vivi bonan vivon. Kaj tiu ĉi rimedo ne nur ne estas fantazia, reva, kiel pensas tiuj, al kiuj ĝi ne estas oportuna, sed revaj estas ĉiuj aliaj rimedoj, per kiuj la gvidantoj de popolamasoj fortrenas ilin sur falsan vojon, detirante ilin de la sole vera vojo.

7.

"Sed eĉ se tio ĉi estas vera, kiam do ĝi efektiviĝos ?" diras la homoj, dezirantaj plejeble baldaŭ ekvidi la efektivigon de tiu ĉi idealo.

Kompreneble, estus tre bone, se eblus efektivigi ĝin tre baldaŭ, tuj.

Estus tre bone, se oni povus tre rapide, tuj grandkreskigi la arbaron. Sed tion ĉi oni ne povas fari, estas necese atendi, ĝis la semoj ekĝermos, ĝis montriĝos la folioj, poste trunketoj kaj poste grandkreskos la arboj.

Oni povas planti la branĉojn kaj por mallonga tempo tio similos arbaron, sed tio estos nur similaĵo.

Tiel same estas ankaŭ kun la rapida bonorganizo de homa socio. Eblas aranĝi la similaĵon de bonorganizo, kiel faras la registaroj, sed tiuj similaĵoj nur malproksimigas la eblon de vera bonorganizo. Ili malproksimigas tiun ĉi eblon, unue per tio, ke ili trompas la homojn, montrante al ili ŝajnon de bonorganizo tie, kie ĝi ne ekzistas ; due, per tio, ke tiuj similaĵoj de bonorganizo estas atingitaj nur per potenco, kaj la estropotenco malmoraligas la homojn tiel la estrantajn kiel la regatajn, kaj tial faras malpli ebla la veran bonorganizon.

Kaj tial la provoj de rapida efektivigo de la idealo ne nur ne kunhelpas, sed pli ol ĉio alia malhelpas ĝian veran efektivigon.

Sekve, la solvo de demando pri tio, ĉu baldaŭ aŭ ne baldaŭ efektiviĝos la idealo de la homaro - la bonorganizita socio sen perforto - dependas de tio, ĉu baldaŭ ekkomprenos la sincere dezirantaj bonon al popolo gvidantoj de popolamasoj, ke nenio tiel malproksimigas homojn de efektivigo de ilia idealo, kiel tio, kion ili faras nun : nome, la subteno de malnovaj superstiĉoj aŭ la neado de ĉia religio kaj la direktado de popola agado je servado al registaro, revolucioj, socialismo... Se nur ekkomprenus la homoj sincere volantaj servi al proksimulo, la tutan vanecon de la rimedoj proponataj de

ŝtatemuloj kaj de revoluciuloj por organizi la bonon de la homoj ; se ili ekkomprenus, ke la sola rimedo por liberigi la homojn de iliaj suferoj konsistas en tio, ke la homoj mem ĉesu vivi egoistan, idolanan vivon, sed komencu vivi la tuthomaran, kristanan vivon kaj ne rekonus kiel nun eblan kaj laŭleĝan la perforton sur la proksimuloj kaj ne partoprenus en ĝi por atingi personajn celojn, - sed kontraŭe, sekvus en la vivo la fundamentan kaj plej altan leĝon konduti je aliaj tiel, kiel vi volas, ke oni kondutu je vi, - tre rapide detruiĝus tiuj neprudentaj kaj kruelaj vivoformoj, en kiuj ni vivas nun, kaj formiĝus nova, konformaj al nova konscio de homoj.

Nur ekpensu pri tio, kiel grandegaj kaj bonegaj spiritaj fortoj estas malŝparataj nur je servo al kaduka ŝtato kaj je ĝia defendo kontraŭ revolucioj, kiom da junaj, flamaj fortoj estas malŝparataj por provoj de revolucio, por la neebla batalo kontraŭ ŝtato, kiom estas malŝparataj por la socialismaj, neefektivigeblaj revoj. Kaj ĉi tio estas farata kun la nura rezulto, ke ne nur malproksimiĝas sed fariĝas neebla la efektivigo de tiu bono, kiun celas ĉiuj homoj. Kio okazus, se ĉiuj homoj, kiuj malŝparas siajn fortojn tiel senutile kaj ofte kun malutilo por proksimulo, direktus ilin al tio, kio sola donas la eblon de bona socia vivo, - al sia interna memperfektigado ?

Kiomfoje oni sukcesus konstrui el nova fortika materialo novan domon, se ĉiuj ĉi fortuzoj, kiuj estis kaj estas malŝparataj por apogi malnovan domon, estus decide kaj bonkonscie uzataj por prepari novan materialon kaj por konstrui novan domon, kiu, kvankam la unuan tempon komprenebie ne povus esti same luksa kaj oportuna kiel estis la

malnova por kelkaj elektitoj, estus sendube pli fortika kaj prezentus plenan eblon por perfektigadoj necesaj ne nur por elektitoj, sed por ĉiuj homoj.

Sekve, ĉio, kion mi tie ĉi diris, resumiĝas en tiu plej simpla, por ĉiuj komprenebla kaj nerefutebla vero, ke por ke inter la homoj estu bona vivo, estas necese, ke la homoj estu bonaj.

Kaj la rimedo por influi bonan vivon al homoj estas : la propra bona vivo. Kaj tial ankaŭ la agado de homoj dezirantaj kunhelpi al aranĝo de bona homa vivo povas kaj devas konsisti nur en interna memperfektigado, en plenumado de tio, kio estas esprimita en Evangelio per la vortoj : "Estu perfektaj kiel via ĉiela Patro."

***

# ĤODINKA

Okaze de la kronado de caro Nikolao IIa en la jaro 1896, sur la Ĥodinka kampo apud Moskvo estis aranĝita granda solenfesto kaj tien estis kunvokata la popolo el la tuta lando, allogate per senpaga disdonado de la cardonaco (pano, kolbaso, dolĉaĵo, biero, viŝtuko kaj emajla kruĉo).

Oni bone pripensis la gardorganizon de la caro mem kontraŭ la "fidelregataro", sed oni tute ne ekpensis pri la movadorganizo de la popolo, - kaj el tio rezultis... 1309 kadavroj oficiale kaj neoficiale pli ol 2000 !...

# ĤODINKA

- Ne, mi ne komprenas tian obstinon. Por kia celo ne dormi kaj iri "en la popolon", kiam vi povas simple morgaŭ veturi kun onklino Vera rekte al la pavilono. Kaj ĉion vi ekvidos. Mi jam diris al vi, ke Ber al mi promesis konduki vin. Kaj ne forgesu, ke, kiel kortega fraŭlino, vi havas rajton tien iri.

Tiel parolis la al tuta supera societo konata sub la nomo "Piĵon" princo Paŭlo Golicin al sia 23-jara filino Aleksandra, kies kutima alnomo estis "Rina".

Tiu ĉi konversacio okazis vespere la 17an de majo 1896 en Moskvo, antaŭtage de la popolfesto de l'cara kronado. La kialo de la konversacio estis jena. Rina, bela, forta fraŭlino, kun karakteriza Golicin-profilo, kurbnaza kiel rabobirdo, jam estis travivinta la periodon de l'entuziasmiĝo je civilaj baloj kaj estis aŭ almenaŭ konsideris sin progresema virino kaj estis defendantino de popolrajtoj. Ŝi estis sola filino kaj tre amata de la patro kaj ŝi faris, kion ŝi volas. Nun al ŝi kapricvenis la penso, kiel parolis la patro, viziti la popol-promenadon kun sia kuzo ne tagmeze kune kun la Kortego, sed kune kun la popolo, kun la kortisto kaj kun la vickoĉero, kiuj intencis eliri el sia domo frumatene.

- Do, al mi, paĉjo, estas dezirinde ne observi la popolon, sed esti kun ĝi. Al mi estas dezirinde vidi ĝian rilaton al la juna caro. Ĉu mi ne povas tion fari eĉ unu fojon ?

- Nu, faru, kiel vi volas. Mi konas vian obstinon.

- Ne koleru, kara paĉjo. Mi promesas al vi, ke mi estos prudenta, kaj Aleko ĉiam estos kun mi.

Malgraŭ strangeco kaj nenormaleco de tiu ĉi fantaziaĵo la patro ne povis ne konsenti.

- Certe, prenu, - respondis li al ŝia demando "ĉu oni povas preni la kaleŝon?" - Vi veturos ĝis Hodinka kaj resendos la kaleŝon.

- Nu, tiel, tiel !...

Ŝi iris al li. Li laŭ kutimo ŝin krucsignis, ŝi kisis lian grandan blankan manon, kaj ili disiĝis.

***

En la sama vespero en la loĝejo luigata de famekonata Mario Jakovlevna al laboristoj el cigaredfabriko, oni parolis pri la morgaŭa promenado. En la loĝejo de Emeljan Jagodnij sidis preteriranta vizitintaj lin kamaradoj kaj interkonsentis pri tempo de eliro.

- Ŝajne, eĉ enlitiĝi oni ne devas, por ne malfrui pro la dormo, - parolis Jaĉjo, gaja knabo loĝanta malantaŭ la vando.

- Kial ni ne dormu ? - respondis Emeljano.

- Ni povos foriri ĉe la matenruĝo. Same decidis ankaŭ la aliaj.

- Nu, se estas decidite dormi, do ni dormu. Nur vi, Semjoniĉ, nepre veku nin.

Semjoniĉ (Emeljano) promesis kaj mem prenis el tablo silkan fadenon, alproksimigis al si lampon kaj sin okupis per alkudro de forŝirita butono al somera palto. Fininte la taskon, li preparis la plej bonan veston, metinte sur la benkon, purigis la botojn, poste preĝis, leginte kelkajn preĝojn : "Patro nia", "Dipatrino", kies signifon li ne estis komprenanta kaj eĉ ne interesiĝis pri ĝi, kaj, demetinte la botojn

kaj pantalonon, kuŝiĝis sur la multeuzitan matracon de l'knarema lito.

- Kial ne ? - li pensis. Ekzistas ja feliĉaj homoj. Povas okazi, ke ankaŭ mi gajnos la loteriobligacian bileton. (En la popolo iris la famo, ke krom la donacoj, oni ankoraŭ disdonos loteriobligaciajn biletojn). Mi ne revas pri la dekmiloj. Mi kontentiĝus eĉ per kvincent rubloj. Jen mi multe farus : al la maljunaj gepatroj sendus, la edzinon liberigus de l'ofico. Ĉu la disa vivo estas bona? Bonegan horloĝon mi aĉetus. La pelton por mi kaj por ŝi mi farus. Ja tuta mia vivo estas seninterrompa penego kaj estas nenia espero eliri el mizero.

Kaj jen li sonĝas, kiel li kun la edzino marŝas en Aleksandra ĝardeno, kaj tiu sama policisto, kiu pasintsomere arestis lin pro tio, ke li ebria insultaĉis, jam ne estas policisto, sed generalo, kaj tiu ĉi generalo parolante kun li afable ridas kaj invitas lin en restoracion aŭskulti orgenon. Kaj la orgeno ludas kaj ludas, simile kiel la horloĝo sonoras. Tiam Semjoniĉ vekiĝas kaj aŭdas, ke la horloĝo muĝas kaj sonoras, kaj la mastrino Mario Jakovlevna malantaŭ la pordo tusas, kaj en la fenestro jam ne tiel estas mallume,kiel estis hieraŭ.

- Estas pli bone ne plu dormi, por ne malfruiĝi.

Emeljano ellitiĝas, iras nudpiede post la vandon por veki Jaĉjon, vestiĝas, oleumas la kapon, sin kombas, rigardas en disbatitan speguleton.

- Sufiĉe bone ! Pro tio ankaŭ fraŭlinoj min amas. Sed mi ne volas flirti.

Li iras al la mastrino. Kiel interkonsentite hieraŭ, li metas en la sakon kukpecon, du ovojn, ŝinkon, duonbotelon da brando, kaj

apenaŭ matenruĝas, kiam ili kun Jaĉjo eliras el la korto kaj marŝas al Petra parko. Ili ne estas solaj : ĉie oni marŝas ; antaŭe, malantaŭe, de ĉiuj flankoj oni eliras kaj kuniĝas sur la saman vojon kaj viroj, kaj virinoj, kaj infanoj, ĉiuj gajaj kaj feste vestitaj.

Jen ili atingis la Ĥodinkan kampon. Kaj tie ĉi jam popolo estas ĉie videbla, kaj el diversaj lokoj la fumo etendiĝas. La matenruĝo estis malvarma kaj la homoj trovas arbobranĉojn, ŝtipojn kaj bruligas lignarojn. Kunvenis Emeljano kun kamaradoj ; ili same bruligis la lignaron, sidiĝis, prenis la almanĝaĵojn, brandon. Kaj jen jam la suno leviĝis, klara, serena, kaj gaje estis. Oni kantas, babilas, petolas, ridas, pri ĉio ĝojas kaj ĝojon atendas. Emeljano kun la kamaradoj ektrinkis, ekfumis kaj fariĝis ankoraŭ pli gaja.

Ĉiuj estis festevestitaj ; inter la festevestitaj laboristoj kaj inter iliaj edzinoj oni povis iafoje vidi ankaŭ riĉulojn kaj komercistojn kun edzinoj kaj infanoj. Kaj tie oni povis vidi Rina'n Golicin, kiam ŝi, gaja, radianta pro la penso, ke ŝi sukcesis efektivigi sian deziron festi la kronadon de la de popolo amata caro, kun la popolo kaj inter la popolo, ŝi promenis kun frato Aleko inter la lignaroj.

- Mi gratulas vin, sinjorino bona ! alparolis ŝin juna fabriklaboristo, almetante la glaseton al la buŝo.

- Ne preterlasu nian panon - salon.

- Dankon.

- Manĝu mem, aldiris Aleko, fanfaronante per sia kono de popolmoroj, kaj ili preteriris pluen.

Laŭ la kutimo ĉiam okupi unuajn lokojn, trairinte la kampon en la amaso de popolo, kie

jam fariĝis dense (la popolo estis tiel multnombra, ke malgraŭ la serena mateno, super la kampo vidiĝis densa nebulo el la spiraĵo de l' popolo), ili sin direktis rekte al la pavilono. Sed la policanoj ne allasis ilin.

- Des pli bone. Ni iru ree tien, diris Rina kaj ili revenis al la popolamaso.

***

- Mensogaĉo! - respondis Emeljano, sidante kun la kamaradoj ĉirkaŭ dismetitaj sur papero manĝaĵoj, al la rakonto de veninta, konata fabriklaboristo, ke oni jam disdonas.

- Mensogaĉo !

- Mi certigas al vi. Kontraŭleĝe, sed oni disdonas. Mi mem vidis. Mi vidis kiel oni portas kaj la saketon kaj la kruĉon...

- Nu, por neniu estas sekreto, ke la komisiuloj ĉiam friponas. Ili nenion atentas. Al kiu ili volas, al tiu donas.

- Sed kial ? Ĉu tio estas permesebla - spite la leĝon ?

- Sekve oni povas !

- Nu ni iru, kamaradoj !

Ĉiuj leviĝis. Emeljano kaŝis sian boteleton kun restinta brando kaj ekmarŝis antaŭen kun la kamaradoj.

Li ne sukcesis fari dudek paŝojn, kiam la popolo tiel densiĝis, ke fariĝis malfacile iri.

- Kien ci arog-iras ?
- Kaj ci kial arog-iras ?
- Ĉu ci estas sola ?
- Nu, sufiĉas !
- Ho, oni dispremis ! ekaŭdiĝis virina voĉo. De alia flanko aŭdiĝis infana krio.

- Iru al la diablo...
- Kion ci faras ?
- Ĉu vi sola bezonas ?
- Oni ĉion disdonos. Nu, mi penos ilin atingi. Diabloj, satanoj !

Tion kriis Emeljano kaj, streĉante sanajn, vastajn ŝultrojn kaj disetendante la kubutojn, li disigadis, kiel povis, kaj antaŭeniris, ne bone konsciante por kia celo, nur tial, ke ĉiuj antaŭenkuris kaj, kiel al li ŝajnis, li nepre devas elŝiriĝi antaŭen. Malantaŭ li, de ambaŭ flankoj estis homoj kaj ĉiuj lin kunpremadis, sed la antaŭstarantoj preskaŭ ne moviĝis kaj tute baris la vojon. Ĉiuj ion kriis, kriadis, ĝemis, vekriis.

Emeljano silentis kaj, kunpreminte la dentojn kaj kuntirinte la brovojn, ne perdante kuraĝon, ne malfortiĝante kaj puŝante la antaŭstarantojn, kvankam malrapide, sed iom post iom sin movis antaŭen.

Subite ĉio ekŝanceliĝis kaj, post ritma movado, ĵetiĝis antaŭen kaj dekstraflanken. Emeljano ekrigardis tien kaj ekvidis, kiel estis preterfluginta iu objekto, poste alia, tria kaj ekfalis en la amasegon. Li ne komprenis, kio estis tio, sed proksime de li iu voĉo ekkriis :
- La diabloj malbenitaj, en la popolamason oni komencis ĵeti.

Kaj tie, kien flugis la saketoj kun la donacoj, aŭdiĝis krioj, ridaĉo, plorego kaj ĝemoj. Emeljanon iu dolore puŝis je la flanko. Li fariĝis ankoraŭ pli morna kaj pli kolera. Sed li ne sukcesis rekonsciiĝi post la doloro, kiam iu surpaŝis lian piedon. La palto, lia nova palto, kontraŭ io alkroĉiĝis kaj disŝiriĝis. En lian koron venis kolerego, kaj li plenforte komencis premegi antaŭstarantojn, puŝante ilin antaŭen.

Sed dume okazis io, kion li ne povis kompreni. Jen li nenion povis vidi antaŭ si, krom la homaj dorsoj, kaj subite ĉio, kio estas antaŭ li, fariĝis videbla. Li ekvidis tendojn, la tendojn, el kiuj oni devis disdonadi la regalaĵojn. Li fariĝis ĝoja, sed la ĝojo daŭris nur unu minuton, ĉar li tuj komprenis, ke por li ĉio fariĝis videbla nur tial, ke ili ĉiuj estis venintaj al rando de kavego, kaj ĉiuj antaŭstarantoj jen stare, jen rule falis en ĝin, kaj li mem estas falanta tien, sur la homojn. Li estas falanta sur la homojn kaj sur lin estas falantaj la aliaj, la malantaŭaj. Kaj jen tiumomente unuafoje lin kaptis la teruro. Li falis. Virino en diverskolora tuko falis sur lin. Li forskuis ŝin de si, li volis reveni, sed de malantaŭe oni premis kaj la fortoj mankis. Li sin movis antaŭen, sed liaj piedoj stariĝis sur io mola, sur la homoj. Oni kaptadis liajn piedojn kaj kriis. Li nenion vidis, nenion aŭdis, kaj trarampadis antaŭen, marŝante sur la homoj.

- Estu fratoj, la horloĝon prenu, la oran ! Fratetoj, helpu ! - kriis homo apud li.

- Ne pri la horloĝo nun oni devas zorgi, ekpensis Emeljano kaj li komencis alproksimiĝi al alia flanko de l'kavego.

Lian animon atakis du sentoj kaj ambaŭ estis turmentaj : unu - la teruro pri si mem, pri sia vivo, la alia - la kolero kontraŭ ĉiuj tiuj freneziĝintaj homoj, kiuj premas lin. Kaj samtempe tiu de la komenco starigita celo : atingi la tendojn kaj ricevi la sakon kun la bombonoj kaj en ĝi la loterian obligacion plu allogis lin.

La tendoj jam estis proksime de li. Oni jam vidis la disdonantojn, oni aŭdis la kriojn de tiuj, kiuj sukcesis atingi la tendojn, estis aŭdebla ankaŭ la krakado de l'trairejoj,

en kiuj amasiĝis antaŭa amaso de homoj.

Emeljano ekstreĉis la fortojn, kaj por li restis jam ne pli ol dudek paŝoj, kiam li subite ekaŭdis sub la piedoj, pli vere inter la piedoj, infanan krion kaj ploron. Emeljano ekrigardis sub la piedojn. Knabo senĉapa, kun disŝirita ĉemizeto, kuŝis surdorse kaj, ne ĉesante plorĝemi, kaptadis la piedojn. Ĉe Emeljano subite io premis la koron. La teruro pri si mem forlasis lin, malaperis ankaŭ la kolero kontraŭ la homoj. Kompato al la knabo superis aliajn sentojn. Li sin klinis, kaptis lin je la ventro, sed malantaŭe starantaj homoj tiel forte ekpremis lin, ke li preskaŭ falis, eligis el la manoj la knabon. Sed tuj, streĉinte la fortojn, li ree ekkaptis lin kaj ekmetis lin sur la ŝultron. La premantoj komencis pli malforte premi kaj Emeljano portis la knabon.

- Donu lin ĉi tien ! - ekkriis la apude marŝanta kun Emeljano koĉero. Li prenis la knabon kaj levis lin super la popolamaso.

- Kuru sur la popolo.

Kaj Emeljano, ĉirkaŭrigardante, vidis, kiel la knabo jen dronante en la amaso, jen suprenleviĝante, sur ŝultroj kaj kapoj de homoj estis antaŭiĝanta ĉiam pluen kaj pluen.

Emeljano plu antaŭenmarŝis. Oni ne povis ne marŝi antaŭen, sed nun lin jam interesis nek donacoj nek atingo de la tendoj. Li pensis pri la knabo kaj pri tio, kien malaperis Jaĉjo, kaj pri tiuj premmortigitaj homoj, kiujn li vidis, kiam li estis trairanta la kavegon. Atinginte la tendon, li ricevis la saketon kaj la kruĉon, sed ĉi tio jam ne ĝojigis lin. Komence lin ĝojigis, ke tie ĉi ĉesiĝis la premado, oni povis spiri kaj iri. Sed tuj eĉ tiu ĉi ĝojo malaperis pro tio, kion li vidis ĉi tie.

Li ekvidis virinon en striita, disŝirita robo, kun malkombitaj blondaj haroj, en ŝuoj kun la butonetoj. Ŝi kuŝis surdorse ; la piedoj en la ŝuoj etendiĝis supren. Unu mano kuŝis sur la herbo, la alia kun alpremitaj fingroj troviĝis sur la brusto apud la mamoj. La vizaĝo estis ne pala, sed blue blanka, kiun havas nur mortintoj. Tiu ĉi virino estis la unua prem-mortigita kaj estis elĵetita ĉi tien, post la palisaron, antaŭ la cara pavilono.

Kiam Emeljano ekvidis ŝin, tiam, kliniĝinte super ŝi staris du policaj soldatoj, kaj policoficiro estis ion ordonanta. Kaj samtempe estis venintaj la kozakoj, la estro ion ordonis al ili, kaj ili ekmoviĝis kontraŭ Emeljano kaj aliaj homoj starantaj tie ĉi, kaj ekpelis ilin malantaŭen al la popolamaso. Emeljano ree trafis en la amason. Ree la premado, kaj la premado eĉ pli malbona ol antaŭe. Ree la krioj, ĝemado de virinoj, infanoj, ree unuj piedpremas la aliajn kaj ne povas ne piedpremi. Sed Emeljano jam nun havis nek la teruron pri si mem, nek la koleron kontraŭ tiuj, kiuj premas lin, - li havis solan deziron foriri, liberiĝi, kompreni tion, kio aperis en la animo, ekfumi kaj ekdrinki. Li tre ege volis ekfumi kaj ekdrinki, kaj li sukcesis tion : li eliris en malmultehoman spacon, ekfumis kaj ekdrinkis.

Sed ne tio okazis al Aleko kaj Rina. Pri nenio zorgante, ili marŝadis inter la sidantoj en la rondetoj parolante kun virinoj, infanoj; subite la tuta popolo ĵetiĝis al la tendoj, kiam disvastiĝis la famo, ke la komisiitoj neleĝe disdonas la regalaĵon.

Rina ne havis tempon por rimarki, kiam ŝi jam estis forpuŝita de Aleko, kaj la popolamaso ekportis ŝin ien. La teruro kaptis ŝin. Ŝi penis silenti, sed ne povis, kaj ekkriis,

petante kompaton. Sed ŝia peto estis vana, ŝin oni premis pli kaj pli, ŝia robo estis disŝirita, la ĉapelo foriĝis. Ŝi ne povis certigi, sed al ŝi ŝajnis, ke oni deŝiris de ŝi la horloĝon kun ĉeneto. Ŝi estis forta fraŭlino kaj povus ankoraŭ kontraŭstari, sed ŝia animstato de la teruro estis turmenta ; ŝi ne povis spiri. Kun disŝirita kaj ĉifita robo, ŝi malforte, tamen rezistis. Sed en tiu momento, kiam la kozakoj ekatakis la popolamason, por dispeli ĝin, ŝi malesperiĝis, tio sekvigis malfortiĝon, kaj ŝi svenis. Ŝi falis kaj nenion plu konsciis.

***

Kiam ŝi rekonsciiĝis, ŝi kuŝis surdorse sue la homo. Iu homo, simila al metiisto, kun barbeto, en disŝirita palto, sidis kaŭre antaŭ ŝi kaj ŝprucigis akvon sur la vizaĝon. Kiam ŝi estis malferminta la okulojn, la homo faris krucsignon kaj elkraĉis la akvon. Tio estis Emeljano.

- Kie estas mi ? Kiu estas vi ?
- Sur Ĥodinka. Kaj kiu estas mi ? Mi estas homo. Same min oni premis. Sed mia homklaso ĉion toleros, diris Emeljano.
- Kaj kion tio signifas ? Rina montris kupr-ajn monerojn sur sia ventro.
- Nu, ĉi tio signifas, ke la popolo jam opiniis vin mortinta, do por la enterigo. Sed fiksinte la atenton, mi ekpensis : ne, vi estas viva. Mi komencis rekonsciigi vin per la akvo.

Rina ekrigardis sin kaj ekvidis, ke ŝi havas ĉifonigitan vestaĵon, kaj parto de ŝia brusto estas nuda. Ŝi eksentis honton. La homo komprenis ŝian senton kaj vestkovris ŝin.
- Nenion signifas, fraŭlino, vi restos viva.

Venis ankoraŭ la popolo, policisto. Rina iomete leviĝis, eksidis, kaj rakontis, kies

filino ŝi estas kaj kie ŝi loĝas. Aŭdinte tion, Emeljano iris por peti la fiakron.

Jam multe da popolo kolektiĝis. Kiam Emeljano revenis kun fiakro, Rina estis leviĝinta. Oni volis helpi ŝin suriri la veturilon, sed ŝi mem tion faris. Ŝi nur hontis pro malordo en sia kostumo.
- Sed, kie estas la frateto ? - demandis Rinan unu el la alvenintaj virinoj.
- Mi ne scias. Mi ne scias, - kun malespero eldiris Rina. (Reveninte hejmen, Rina eksciis ke Aleko, kiam komenciĝis la popolpremado, sukcesis liberiĝi el la homamasego kaj estis reveninta hejmen sen iu ajn vundiĝo.)

- Jen, li savis min, - parolis Rina. Se ne li, mi ne scias, kio okazus. Kiel vi estas nomata ? - sin turnis ŝi al Emeljano.
- Ĉu min ? Ne valoras tion scii.
- Princino ja ŝi estas, - parolhelpis al li unu el la virinoj, - ri-ĉe-ga.
- Ni veturu kune al la patro. Li vin rekompencos.

Kaj subite ĉe Emeljano en la animo kreskis io tiel potenca, kion li ne ŝanĝus eĉ kontraŭ ducentmila mongajno.
- Kion mi ankoraŭ rajtas postuli ! Ne, fraŭlino, iru trankvile. Por kio rekompenci ?
- Sed mi petas, alie mi ne estas trankvila.
- Adiaŭ, fraŭlino ! Dio vin helpu. Nur nian palton ne kunprenu.

Kaj li ekridetis tian blankdentan, gajan ekrideton, kiun Rina ĉiam rememoradis konsole dum la plej suferaj momentoj de sia vivo.

***

# NE MORTIGU!

Kiam oni ekzekutas, laŭ la formoj de l'justico, iujn reĝojn : Karlon la Ian, Ludovikon la XVIan, Maksimilianon de Meksikio, aŭ kiam oni buĉas ilin okaze de kortega revolucio : Petron la IIIan, Paŭlon la Ian, diversajn sultanojn, ŝahojn kaj ĉiniajn imperiestrojn, tio estas faktoj, kiujn oni ĝenerale prisilentas. Sed kiam oni forigas ilin sen la justica aparato kaj ekster kortegaj revolucioj, kiel Henrikon la IVan, Aleksandron la IIan, la aŭstrian imperiestrinon, la persan Ŝahon, kaj freŝdate la reĝon Humberto, tiuj murdoj naskas ĉe la imperiestroj, la reĝoj kaj ties kunvivantaro, ĝeneralajn indignon kaj surprizon, kvazaŭ tiuj suverenoj mem ne partoprenus murdadojn, ne profitus de ili kaj ilin ne ordonus.

Tamen la murditaj reĝoj, eĉ la plej bonaj, kiaj Aleksandro la IIa kaj Humberto, kulpis aŭ komplicis en la murdado de miloj kaj miloj da homoj, kiuj pereis sur la batalkampoj ; dum la malbonaj suverenoj pereigis la homojn centmilope kaj milionope.

La Krista doktrino abolicias la leĝon "Okulon pro okulo, denton pro dento". Sed la homoj, kiuj ĉiam praktikis tiun leĝon kaj kiuj ankoraŭ hodiaŭ ĝin obeas, aplikas ĝin laŭ teruraj proporcioj, per izolitaj punadoj aŭ ekstermas unuj la aliajn en militoj, kaj postulas ne nur okulon pro okulo, sed, kvankam neprovokite, ordonas murdi milojn da estuloj. Tiuj homoj ne rajtas indigni, ke oni siavice aplikas tiun leĝon al ili mem, kaj en tiel eta skalo, ke oni nombrus apenaŭ unu imperiestron aŭ reĝon el cent miloj, eble unu miliono da individuoj mortigitaj laŭ

ilia ordono aŭ kun ilia konsento.

Ne indignu la suverenoj pro la murdoj al Aleksandro la IIa aŭ al Humberto, sed prefere miru, ke tiaj murdoj tiom maloftas kompare kun la konstanta kaj universala murd-ekzemplo, kiun donas la suverenoj mem.

La popolamasoj estas kvazaŭ hipnotigitaj : ili ne komprenas la signifon de kio okazas antaŭ ili. Ili ne vidas la reĝojn aŭ la prezidentojn senĉese okupatajn pri milita disciplino, revuoj, paradoj kaj manovroj, kiujn ili ĉeestas kaj pro kiuj ili vantiĝas. Homoj kure alsvarmas por vidi siajn fratojn, vestaĉitajn per multkoloraj kaj brilantaj vestaĵoj, transformitajn en maŝinojn kaj kiuj, laŭ tamburoj kaj trumpetoj kaj laŭ la komando, samtempe faras saman geston sen kompreni ĝian signifon.

Tamen tiu signifo estas simpla kaj klara : ĝi estas nenio alia ol la preparado al murdo ; ĝi estas la brutigo de la homoj por fari el ili murdilojn.

Tio estas la plej ŝatata kaj vanta okupo de l'nuraj imperiestroj, reĝoj kaj prezidentoj. Nu, estas ili, kiuj fariĝis murd-fakuloj, kiuj surhavas militistajn uniformojn kaj murdilojn, estas ili, kiuj indignas, kiam unu el ili oni mortigas !

La reĝ-murdo, kia la tutfreŝa kontraŭ la reĝo Humberto, ne teruras pro la krueleco de la fakto mem. La agoj, kiujn krimis en la pasinteco la reĝoj kaj la imperiestroj : tiel la Sankta Bartolomeo, la religi-militoj, la senkompata subpremo kontraŭ la kamparanaj ribeloj, kiel la nuntempaj registaraj ekzekutoj, la martirigo en la karceroj kaj la disciplin-rotoj, la pendumo, la gilotino, la dummilitaj pafado kaj buĉado, tiuj agoj ne povus pro sia krueleco esti komparataj kun la

atencoj de la anarkistoj.

La anarkistaj krimoj ne estas teruraj, ĝuste pro tio ke la viktimoj ne meritis sian sorton. Se Aleksandro la IIa aŭ Humberto ne meritis esti murditaj, la miloj da Rusoj, kiuj pereis ĉe Plevna, kaj da Italoj en Abisinio ankoraŭ malpli meritis tion.

Se la reĝ-murduloj agas pro influo de persona indigno naskita de la suferoj de subpremata popolo, pri kiuj ili juĝas kulpaj Aleksandron, Karnoton aŭ Humberton, aŭ se ili agas pro venĝemo, iliaj agoj, kiel ajn malmoralaj ili estas, tamen estas kompreneblaj. Sed leviĝas demando : kial la anarkistoj ne povas imagi ion pli bonan por plibonigi la popolsorton, ol murdi homojn, kies malapero tiel vanas, kvazaŭ oni senkapigus tiun fabelan monstron, sur kiu nova kapo rekreskus ĉe loko de l'malnova ?

Nu, ĉu utilas mortigi ilin ?

Sufiĉus memori, ke la sama subpremo, la samaj militoj ĉiuepoke okazis, sub kiu ajn regnestro : Nikolao aŭ Aleksandro, Frederiko aŭ Vilhelmo, Napoleono aŭ Ludoviko, Palmerston aŭ Gladstone, Mac Kinley aŭ aliu ajn, kaj oni komprenus, ke tute ne estas tiu aŭ tiu ĉi estro la kaŭzo de l'plagoj, kiujn suferas la popoloj. Tiuj plagoj estas la konsekvenco de socia organizo tiel premanta ĉiujn socianojn, ke ĉiujn subjugigas nur kelkaj homoj, plejofte ununura. Ĉi-lastaj estas tiel perversigitaj pro sia monstra potenco, kiu metas sub ilian gvidadon la vivon de milionoj da individuoj, ke ili estas trafitaj de megalomanio, kion oni ne ekvidas nur pro ilia alta socirango.

Tuj de sia naskiĝo ĝis la tombo, tiuj homoj estas ĉirkaŭitaj de senretena lukso kaj vivas en la ĝin akompananta etoso de mensogo kaj hipokrito. Ilia edukado, ilia tuta aktiveco

havas ununuran celon : studadi kiamaniere okazis la murdoj en la pasinteco, la plej bonajn murdprocedojn niaepokajn kaj prepari sin al tiuj murdoj. Ili daŭre surportas la ilojn de l'detruo : sabrojn kaj spadojn ; ili vestaĉas sin per ĉiuspecaj uniformoj, okazigas revuojn kaj paradojn, vizitas unu la alian kaj interdonacas ordenojn aŭ milittitolojn ; kaj ne nur neniu kvalifikas per la vera vorto kion ili faras, nek diras, ke estas abomene kaj krime sin prepari al murdigo, sed krome ili ricevas kuraĝigojn kaj gratulojn. Je ĉiu ilia vizito, je ĉiu trup-revuado, entuziasma popolamaso sekvas ilin, kaj ili kredas, ke estas la tutpopolo, kiu aprobas ilian konduton.

La nuraj gazetoj, kiujn ili legas kaj kiuj ŝajnas al ili la spegulo de l'sentoj de la tuta nacio aŭ de ties plej bonaj reprezentantoj, plej servile laŭdegas iliajn parolojn kaj agojn, kiel ajn stultaj kaj aĉaj tiuj estas.

Ilia ĉirkaŭularo, tiel viroj kiel virinoj, pastroj kaj laikoj, ĉiuj, por kiuj bagatelas la homa digno, vete klopodas kuraĝigi ilin per la plej subtila flatado, ilin trompi ne lasante al ili ekvidi la mensogon, kiu ĉirkaŭas ilian tutan ekziston. Cent jarojn ili povas vivi kaj tamen sen vidi ununuran reale liberan homon, neniam aŭdante la veron. Iafoje oni tremas pro abomeno, aŭskultante iliajn parolojn kaj vidante iliajn agojn ; sed se oni momente pripensas ilian situacion, oni komprenas, ke en samaj cirkonstancoj ĉiu ajn alia agus same. Prudentulo, kiu troviĝus en tia situacio, povus havi nur unu sintenon: foriri. Se li restus, li agus samkiel ili.

Efektive, oni demandas al si, kio devas okazi en la kapo de iu Vilhelmo - mensbarita viro, mezedukita, vanta, kaj kiel idealon

nur tiun de germana junkro - kiam ĉiun el liaj stultaĵoj aŭ malnoblaĵoj salutas iu entuziasma "hoch" kaj komentas la universala gazetaro kiel gravegan eventon ? Se li diras, ke, ĉe gesto lia, liaj soldatoj devas mortigi eĉ siajn patrojn, oni krias "hura!". Se li diras, ke oni disvastigu la Evangelion per frapoj de fergantita pugno : "hura!". Ankoraŭ "hura!", se li ordonas al la trupoj, kiujn li sendas al Ĉinio, neniun indulgi. Kaj, anstataŭ enfermi lin en pundomo, oni velas al Ĉinio por plenumi liajn ordonojn.

Aŭ jen Nikolao la IIa, kvankam nature modesta, kiu komencas sian regadon, deklarante al respektindaj plejaĝuloj, ke ilia deziro regi la proprajn aferojn laŭ propra plaĉo estas nur sensenca revo. Kaj la gazetoj, kiujn li legas, la homoj, kiujn li vidas, aprobas lin kaj gloras liajn virtojn. Li proponas projekton por universala malarmado, infanecan kaj ridindan, kaj samtempe li plialtigas la nombron de siaj soldatoj ; tamen neelĉerpeblas la laŭdoj pri liaj saĝo kaj virtoj. Sen kialo kaj sen neceso li ofendas kaj martirigas tutan popolon, la Finlandan, kaj oni tamen ne malpli laŭdas lin. Fine li organizas sensencan buĉadon en Ĉinio, kaj tion kontraŭstare al sia propra projekto de universala paco ; tamen, oni el ĉie laŭdegas kaj liajn sangajn triumfojn kaj lian fidelecon al la pacpolitiko de lia patro.

Tial oni devas demandi al si, kio okazas en la kapo kaj la koro de tiuj homoj ?

Oni povas diri, ke la subpremadon de l'popoloj kaj la maljuston de l'militoj kulpas nek la Aleksandroj, nek la Vilhelmoj, nek la Humbertoj, nek la Nikolaoj, kiuj organizas tiujn murdojn, sed ja tiuj, kiuj lokis ilin kaj plu tenas ilin en ilia pozicio de disdonantoj de la homa vivo.

***

Tial neniel utilas mortigi la Aleksandrojn, Nikolaojn, Vilhelmojn kaj Humbertojn. Simple oni ĉesu subteni la socian organizon, kiu naskas ilin. Nu, la nuna reĝimo konserviĝas nur dank'al la egoismo kaj la brutiĝo de l' homoj, kiuj forvendas sian liberon kaj sian dignon interŝanĝe de senvaloraj materiaj avantaĝoj.

Tiel kondutas la homoj troviĝantaj sur la malsuperaj gradoj de la socia hierarkio, parte ĉar ilin brutigis fuŝedukado, parte pro ilia persona intereso, sed profite al tiuj lokitaj ĉe supera ŝtupo. Sammaniere agas tiuj, kiuj troviĝas ĉe pli alta socigrado, pro la samaj kaùzoj, cele al la samaj avantaĝoj, kaj profite al tiuj ankoraù pli alte lokitaj. Tiel oni atingas la plej altajn ŝtupojn de la hierarkio, ĝis la personoj - aù la persono - kiuj situas ĉe la supro de l'konuso kaj havas nenion plu akirotan ; por ĉi-lastaj la sola agmotivo estas la ambicio kaj la vantemo. Kaj ili estas tiel brutigitaj kaj koruptitaj pro sia senlima potenco kontraù siaj samuloj, pro la flatemo kaj la hipokriteco de sia ĉirkaùantaro, ke, kvankam malbonagante, ili estas absolute konvinkitaj pri sia rolo de bonfarantoj de l'homaro.

La nacioj, kiuj foroferas sian dignon profite al siaj materiaj interesoj, per tio mem naskas homojn, kiuj ne povas konduti aliel ol ili faras. Tamen tiuj nacioj ekkoleras kontraù la stultaj kaj malicaj agoj de la mastroj, kiujn ili mem trudas al si. Nu, puni ilin, tio signifas vipi infanojn, kiujn oni mem perversigis.

Do tre simpla la solvo. Por forigi la jugon, kiu pezas sur la popoloj, kaj la senutilajn militojn, por mutigi la indignon kontraù tiuj, kiuj ŝajnas kulpi tion, kaj por ke oni ĉesu mortigi ilin, malmulto sufiĉus :

kompreni la aferojn tiaj, kiaj ili estas, nomi ilin per ties nomo, diri ke armita trupo estas murdilo, ke la organizado de armeo, tasko kiun tiel memfide prezidas la ŝtatestroj, estas la preparado al murdo.

Ĉiu imperiestro, rego aŭ respublikprezidento ekkonsciu, ke lia funkcio de armeestro estas neniel honordona, nek grava, kiel kredigas al li liaj korteganoj, sed male, malutila kaj hontinda ; ĉiu honestulo komprenu, ke pagi la imposton dediĉitan al vivtenado kaj armado de la soldataro, kaj ankoraŭ pli, persone servi en la armeo, konsistigas ne sensignifan agon, sed ja malmoralan kaj hontindan, kaj tuj la arbitro de l'imperiestroj, reĝoj kaj prezidentoj, kiu tiom indignigas nin kaj estigas ilian murdon, malaperos per si mem.

Ne utilas do mortigi la Aleksandrojn, la Karnotojn, la Humbertojn kaj aliajn ; kio necesas, tio estas konvinki ilin, ke ili mem estas murdemuloj, sed ĉefe malpermesi al ili mortigi, aŭ rifuzi mortigi laŭ ilia ordono.

Se la homoj ankoraŭ ne tiel agas, tio estas simple ĉar la registaroj, movate de konservinstinkto, tenadas ilin en hipnota stato. Tial oni klopodu malebligi la murdojn, kiujn kulpas la ŝtatestroj, kaj ĉesigi la interpopolan buĉadon, ne per aliaj murdoj - ĉar, male, ili nur pliigus la hipnoton - sed per vekado, kiu detruos tiun hipnoton.

Tion mi provis fari en la ĉi-supra artikoleto.

***

Notoj de SAT-broŝurservo

**********************

* La antaŭparolo de Romain Rolland, "Patriotismo kaj registaro" kaj "Al politikistoj" estas represitaj el "Tri Verkoj de Leo Tolstoj", unua broŝuro eldonita de S.A.T., 1921. El la rusa lingvo tradukis J.M. Kelkloke modifis la lingvon SAT-broŝurservo.
* "Ĥodinka" estas ĉerpita el la samtitola broŝuro publikigita de S.A.T., 1929. Tradukis V. Ĵavoronkov.
* "Ne mortigu!" jam aperis, 1974, en la kadro de LJP-broŝurservo. Esperantigis Kribo.

***************************************************

Directeur de publication : J. Simonet. CPPAP n° 58651
Imprimeur : C. Baudé, F 47340 Laroque Timbaut